

Bulteno de la Nordfrancia Esperanto-Federacio – Fondita en 1908



La Vorto de la Prezidanto

Norda Francio mondfama

“La 30-an de Junio, la tuta mineja parto de nia regiono estis oficiale agnoskita de **UNESKO**: valora Monda Heredaĵo. Post du monatoj, la 4-an de Decembro 2012, la franca prezidento kun aro da ministroj inaŭguros la idon de la plej granda kaj plej prestiĝa muzeo en la mondo, **Le Louvre**, en la karbomineja urbo **Lens**. Tiuj du eventoj forte kortuŝas min. Revenas al mia memoro la neforgesibla bildo de forpasintaj karbo-ministoj, multaj el ili estis miaj familianoj aŭ amikoj kaj eĉ samideanoj. Pluraj inter vi certe ne forgesis **Ignace FLACZYNSKI** el **Houdain**, **Tadeusz NOWAK** el **Avion**, kaj dekon da iliaj kolegoj, kiujn ili verbis kaj esperantistigis. Hodiaŭ, kiel mi kaj vi, ili certe larmus, ĝojus, kaj fierus.

Ni ekuzu tiujn du enormajn plusojn por doni novan impulson al niaj ĵus komenciĝintaj Esperanto-kursoj. Multaj esperantistoj tra la mondo volos konatiĝi kun ni kaj niaj valoraj vidindaĵoj. En niaj kluboj estas bonega okazo por monde korespondi per Esperanto, papere, rete, skajpe, telefone. Eble eĉ plani reciprokajn vizitojn kaj ĝemeligon de asocioj... Por bone sukcesi, ni devas daŭre

Sekvo p. 2 • • •

La 9-an de Junio 2012 en Araso : Tutmonda sesio de la KER-ekzamenoj

De pli ol dek tagoj ĉiutage pluvas, ventas kaj grizaĉas la ĉielo. Sed ĉi-matene ĉirkaŭ la 7-a h. ridetas la suno en blua ĉielo, aŭgurante agrablan veteron kaj bonhumoran etoson por la disvolviĝo de la KER-ekzameno en Araso; kiun mi estas partoprenonta kiel helpanto.

Mi ja deĵoros en la teamo de la ekzamenantoj, sub la daŭre afabla regado de la ĉeforganizanto **Arlette P.**, kun **Edmond P.**, kaj **Julia H.**

Fakte la lokaj organizantoj – kaj aparte **Arlette!** – rajtas fieri. Ja en Araso enskribiĝis 18 kandidatoj, por trapasi la skriban tutmondan sesion de KER, organizitan de UEA kaj aparte efike de **Katalin KOVÁTS** (la aktiva estrino de “Edukado.net”). Tiu nombro de kandidatoj situigas Arason en la duan rangon en Francio, post Grenoblo... Kaj en la kvinan rangon en la mondo!...

El la 18 kandidatoj, 5 trapasos la nivelon B1 (elementan), 9 trapasos la nivelon B2 (praktikan), 4 trapasos la nivelon C1 (superan).



Agrabla etoso en Araso antaŭ la ekzameno.

Jam alvenante en la ekzamenojn, mi povas konstati la prigratulindan efikon de la organiza paro **Arlette kaj Edmond**.

Tabloj kaj seĝoj estas aranĝitaj surgluitaj de slipoj kun nomo kaj koordinatoj de ĉiu kandidato. Kafo, teo, sukoj, kun kringoj kaj krakenoj estas je la dispo de la alvenantoj.

Ĉefe, amaso da dokumentoj, regularoj, demandoj, preparitaj kaj senditaj de **Katalin K.** kuŝas sur la tablo de la organizantoj.

Ili estis zorge studitaj de **Arlette** kaj ili atestas la ampleksan laboron faritan antaŭ kaj farotan dum kaj post la ekzameno.

plibonigi niajn kompren-leg-skrib-parol-kapablojn. Tion ni faru, nek streĉe nek strese, sed gaje, ĝoje, ĝue. Esperanto estas kaj daŭre devas esti **PLEZURO!**

Petu la 18 trapasintojn de la KER-ekzamenoj, ili unuanime respondos al vi, ke eĉ trapasi Esperanto-ekzamenon "estas ja plezur'!". Oni plibonigas sian lingvo-nivelon, kaj grave kontribuas al la prestiĝo de Esperanto. Pli bona lingvo-nivelo permesas al ni malkovri nian belan kaj riĉan literaturon, kaj plene aprezi la internaciajn renkontiĝojn, fontojn de vera homa disvolviĝo.

Denove, ĉi jare, vi havas la eblecon sekvi la tre interesan preparon al la diversaj ekzamenoj dum nia 24-a Eŭropa Rendevo en **Stella-Plage**. Vi estas gvidataj de Katalin KOVÁTS, akademiano, kreinto de Edukado.net kaj elektita "Esperantisto de la jaro 2011" kaj de Anne JAUSIONS, Prezidanto de la prestiĝa OSIEK.

La posedantoj kaj la ne-posedantoj de ĉiuj ekzamenoj povos daŭre kleriĝi dum la "Mil unu noktoj" kun ties elstara tradukanto Daniel MOIRAND (akompanata de "La Grafo de Monte-Kristo").

Se vi preferas gajumi, parolante kaj agante, Sylvain LELARGE estos via gvidanto. Siavice Claude JAUSIONS humure instruos la komencantojn.

Ni akceptas ankaŭ verdajn pigruolojn, ili povos lacertumi en la samtaga (fakte tritaga) libro-salono de **Le Touquet**.

Neniu maltrafos la vesperan jubilean koncerton de Jacques YVART (ni kunfestos lian 30-an KD-on!) kaj ĉiuj retroviĝos en nia jam tradicia nokta knajpo.

Plie diversaj kolektoj, artaĵoj, libroj kaj premioj surprizos vin!

Ĝis tre baldaŭa revido en **Stella-Plage**, en la bela, komforta feriejo **Stella-Maris**, man-konstruita antaŭ 60 jaroj de karbo-ministoj. Tie ili feris ĉiujare por ĝui la dunojn, la sunon, la maron, la amikan etoson kaj por flegi la sanon. //

Arlette PLUTNIAK (bofilino de karmemora karbo-ministo)

Ili ankaŭ instigas al admiro pri la prepara laboro de Katalin KOVÁTS. Krome ĉi-tiu, dum la tuta sesio, komunikos rete kaj telefone kun ĉiuj tutmondaj ekzamenetoj. En Araso Julia H. plenumas la taskon deĵori ĉe la komputilo kaj komuniki la rimarkojn kaj instrukciojn de Katalin.

Ĉiuj organizantoj kaj kandidatoj alvenas – pli ol akurate – frue antaŭ la 9-a horo, oficiala horo de la malfermo de la sesio kaj de la komenco de la ekzercoj.

Ĉeestas ankaŭ la korespondantoj de du lokaj gazetoj, kies raportoj povos atesti pri la sukceso de la evento kaj pri la Arasa, franca kaj tutmonda daŭra vivo de Esperanto, kun ĝiaj karakterizoj kaj avantaĝoj lingvaj, kulturaj kaj sociaj.

La partoprenantoj estas ankaŭ honorigataj de la ĉeesto de Marie-Hélène GARCIA. Ŝi estas profesoro de la hispana lingvo en la universitato. Ŝi estas la honora malfermanto de la sesio; kaj ŝi solene malfermas la zorge sigele fermitajn kovertojn kun la ekzameneroj.

Ĉi-tiuj estas disdonitaj post oficiala malfermo sendita pere de komputilekrano de Katalin KOVÁTS.

Ŝi sciigas, ke partoprenas en la sesio 1000 kandidatoj el 50 landoj tra la mondo... Tial ke ĉieaj ekzamenoj okazos je la sama loka oficiala horo (ekde la 9-a h. dum: 2 horoj por B1, 3 horoj por B2, 4 horoj por C1), ni povas supozi, ke Katalin estas deĵoranta ĉe sia komputilo dum ĉirkaŭ 30 horoj!...

La ekzameno disvolviĝas senprobleme en granda disciplino kaj konstanta silento. Ĉiuj el la tri partoj – B1, B2, C1 – finiĝas akurate je la antaŭviditaj horoj.

Ĉiuj ekzamenoj redonas siajn plengitajn dokumentojn, kiuj estas tuj fotokopiitaj kaj zorge enkovertigitaj de Arlette por sendo al **ITK-ELTE** (Hungara Ŝtata Centro de la Lingvoj) por korektado kaj taksado; dum la rezultoj estos senditaj post 5/6 semajnoj.

Ĉiuj ekzamenoj volonte submetiĝas al intervjuo farita de la organizantoj, surbaze de demandaro zorge kaj detale preparita de Katalin.

El tiuj intervjuoj rezultas, ke:

Ĉiuj kandidatoj unuanime kontentas kaj bone esperas sukcesi pri la jusa skriba ekzamenero. Ĉiu deziras trapasi la parolan parton, kiu kompletigas la diplomon, kaj kies kondiĉoj estos difinitaj de Katalin K. en la renkontiĝo de Stella-Plage.

Ĉiuj unuanime, en ĉiu nivelo, deklaras, ke la klarigoj donitaj estas perfekte kompreneblaj kaj neambiguaj.

Kelkiuj mencias iujn renkontitajn malfacilaĵojn:

- En B1, unu konsideras, ke la trudo de limo de la nombro de vortoj de iuj respondoj kreas malfacilon.
- En B1, du deklaras, ke mankis tempo.
- En C1, estis trovitaj du (negravaj) tajperaroj en la demandoj.
- En C1, la lasta ekzerco pritrudas intelektajn malfacilajn gimnastikaĵojn; sed sen malfacilaĵoj aŭ insidaĵoj lingvaj aŭ prilingvaj.

Certe estas dirinde, ke tiu KER-sesio en Araso estis granda sukceso. Kaj mi revenas en Bersée tre kontenta. Mi certas, ke hodiaŭ progresis – TRA LA MONDO – la ideo pri Esperanto, kaj la nombro de samideanoj kaj de interesatoj.

Dankon kaj gratulon al Arlette, al Edmond... Kaj al Katalin.

Redaktita de Claude LONGUE-ÉPÉE



El Amieno (Esperanto 80)

“Espéranto 80” denove en gazeto

Jean-Claude ROY, membro de la asocio kaj ĝia antaŭa prezidanto, estis intervjuata de Jeanne DEMILLY, ĵurnalistino en la “*Courrier Picard*”. Plena paĝo aperis en la eldonaĵo de la dimanĉo 26-a de Aŭgusto.

Sur la retejo de la gazeto, la informoj estis dispartigitaj sur du repaĝojn :

– Unu, kies titolo estas : “*Salŭelo – ili parolas Esperanton la lingvon internacian*”; kiu raportis pri la intervjuo. Ligilo : <http://minilien.fr/a0n1ir>

– Unu alia, kies titolo estas La asocio “*Espéranto 80*”, kiu parolas pri la asocio, la diversaj asocioj, el kiuj la Federacio “*Espéranto-Nord*”, kaj pri la peticio www.esperanto-au-bac.fr Ligilo : <http://minilien.fr/a0n1is>



Sekve al tio, Jean-Claude sendis retmesaĝon al Barbara POMPILI, deputitino de la 2a distrikto de la departemento Somme (*Europe – Écologie – les Verts*), legebla sur la retejo de “*Espéranto 80*”, t.e. www.esperanto80.org Ligilo : <http://minilien.fr/a0n1it>

Dankon al Jean-Claude pro lia gravega partopreno por tiu artikolo.

Raportas Cyrille DÉCOUTURE

ENHAVO

ASOCIAJ TEMOJ

Fede ★ Tutmonda sesio de la KER-ekzamenoj	p1
E080 ★ “Espéranto 80” denove en gazeto	p3
E080 ★ Baldaŭaj ŝanĝendaĵoj sine de “Espéranto 80”	p3
ArE ★ Agad-raporto el Araso	p3
BuE ★ “Centre Pompidou” en Bulonjo-ĉe-Mar	p6
DuE ★ Agad-raporto el Dunkirko	p6
DuE ★ Dunkerque – Krefeld	p6
LVE ★ Jarraporto LVE	p7
LVE ★ La prelego de Roman DOBRZYNSKI pri “Bona Espero”	p8
VaE ★ Agad-raporto el Valenciano	p9

El Amieno

Baldaŭaj ŝanĝendaĵoj sine de “Espéranto 80”

La pikarda asocio “*Espéranto 80*”, post longa tempo de aktiveco, devas iel sin renovigi.

Unue la statutoj, verkitaj en la jaro 2004, ne plu validas. Ekzemple, ĝi tute ne pritraktas la aliĝon de “*Espéranto 80*” al la Norda Federacio. Plie ĝi ne estas sufiĉe preciza.

En multaj punktoj de la teksto, ni aktuale ne povas trovi solvojn al eventualaj problemoj, kiuj povus trafi la asocion. Ĝi nun aspektas pli kiel “*laŭleĝa ebligilo por esperantumi libervole*” ol kiel vera fundamenta regularo de homa societo. Pro tio ĝi devas esti tute reverkita por fariĝi

vere uzebla kaj fidinda.

Alia punkto de renovigo: la prezidanto deziras rezigni pri sia posteno. Estas pluraj kialoj por klarigi tiun decidon.

Unue li estas prezidanto jam de la jaro 2004. Bedaŭrinde neniu de tiam deziras repreni la torĉon. Sen ebleco trovi anstataŭanton, li do ĝis nun prokrastis rezigni la postenon!...

Due, li nun loĝas ne plu en la departemento Somme, sed en la departemento Seine-Maritime.

Tio kaŭzis problemetojn kun la komunumo “*Salŭelo*”, en kiu oficiale sidas la asocio. Kompreneble, por ili

ne estas logike, ke la plej fora, la malplej disponebla el la membroj de “*Espéranto 80*” nun loĝanto de la departemento 76 (poŝt-kodo de la Seine-Maritime) devas plu esti ties prezidanto, kaj reprezenti la *Espéranto80*-membrojn.

Estas jam antaŭvidite, ke la membroj de la asocio devas renkontiĝi en eksterordinara kunveno (je la 6a de Oktobro). Tiukaze ili devos kune decidi, kiu povus anstataŭi la ĝisnunan reprezentanto kaj kune analizi projekton de renovigo de la statutoj.

Redaktis Cyrille DÉCOUTURE

El Araso

Agad-raporto el Araso


Ĉi-printempe ni eksciis, ke baldaŭ okazos la unua tutmonda trinivela skriba KER-ekzamensio de UEA-ITK, organizita de Katalin KOVÁTS.


Kompreneble la Norda Federacio tuj decidis trapasigi KER-ekzamenon en Araso. Kiel kutime, Arlette kaj Edmond PLUTNIAK fortege insistegis, ke ĉiuj

geklubanoj nepre trapasu ĝin.

Mi ja provis argumenti, ke mi estas nun tro maljuna kaj kaduka por sukcesi ĉe kia ajn ekzameno, sed


Arlette proklamis, ke pli gravas partopreni, ol sukcesoj. Mi do konsentis enskribiĝi je la nivelo A0, sed ŝi asertis, ke la plej facila nivelo estas B1. Mi do proponis fortan monsumon por akiri la B1-diplomon, sed ŝi rifuzis. Kiam evidentiĝis, ke eĉ kelkaj freŝbakitoj trapasos la B2-ekzamenon, mi ne plu povis eviti trapasi la C1-terurajon...

 La 1-an de Majo disvolviĝis sur pluraj Arasaj stratoj kaj placoj la tradicia "Salon du Livre d'expression populaire et de critique sociale", kaj Arras-Esperanto starigis komunan Esperanto-budon kun SAT-Amikaro, kio ebligis prezenti kaj multfoje subskribi la petskribon "L'espéranto au bac!".

 Dimanĉon la 20-an de Majo okazis en *Nœux-les-Mines* la ĉi-jara forumo de la *MJC*. Ĉar mia Esperanto-budo troviĝis apud la biblioteko kaj survoje al la necesejo, multaj homoj ekvidis miajn panelojn, kaj pluraj el ili ne sukcesis eviti min. Kiam mi proponis, ke ili subskribu la peticion "L'espéranto au bac!", ilia tuja reago plej ofte estis: "Esperanto, ĉu? Kio estas tio?". Kelkaj el ili tamen respondis: "Ha! Jen bonega ideo! Ankaŭ mia patro (aŭ onklo) estis esperantisto". Kiam unu viro diris al mi: "Estus pli bone, ke niaj gejunuloj unue ellernu la anglan!", mi iomete eksaltis, sed tuj rebatis: "Por ke ili vere ellernu la anglan, necesus komenci la instruadon antaŭ la naskiĝo, kaj daŭrigi ĝin ĝismorte! Mi ja instruis anglalingve matematikon kaj komputikon al gelnantoj, kiuj jam de pli ol ses jaroj ricevis ĉiusemajne kromajn kursojn pri la angla lingvo, kaj ili asertis, ke ili ankoraŭ ne kapablas legi anglalingvan romanon aŭ spekti anglalingvan filmon! Sekve, se ili devus unue lerni ĝisfunde la anglan antaŭ ol eklerni Esperanton, ili mortus antaŭ ol havi okazon lerni la internacian lingvon...". Li nek respondis nek subskribis...

Nu, entute sepdek homoj konsentis subskribi la peticion. Kaj tri aŭ kvar virinoj tiel vigle entuziasmiĝis pri la internacia lingvo, ke ili promesis

viziti baldaŭ mian kurson. Sed hodiaŭ ŝajnas al mi, ke la vorto "baldaŭ" nuntempe signifas "eble post pluraj semajnoj, eble neniam...".


 Sabaton la 9-an de Junio mi ekvidis (je la 8a30 matene!) meze de dek sep aliaj viktimoj en salono de la Arasa Kulturoficejo. Antaŭ ni staris ne nur du ĵurnalistoj senditaj de *L'Avenir de l'Artois kaj L'Observateur de l'Arrageois*, sed ankaŭ *Julia HÉDOUX* (vicprezidantino de U.F.E.), *Arlette PLUTNIAK* (prezidantino de la Norda Federacio), *Claude LONGUE-ÉPÉE* (iama prezidanto de U.F.E.), *Edmond PLUTNIAK* (iama prezidanto de *Arras-Espéranto*), kaj esceptokaze *Marie-Hélène GARCIA*: universitata profesoro, kiu, dum ni solene aŭskultis solenan mesaĝon de *Katalin KOVÁTS*, solene malfermis la kovertegon enhavantan la oficialajn demandojn de la tutmonda *KER-ekzameno*. Menciindas, ke ĉeestis ankaŭ *Jacky RAMON* (nuna prezidanto de *Arras-Espéranto*), sed li tute malsolene sidis kiel mi inter la viktimoj...


lom post iom la soleneco fariĝis preskaŭ ne eltenebla, sed feliĉe la ĵurnalistoj baldaŭ komencis foti nin, kio tre helpas min konvinki mian edzinon, ke mi ne forveturis al la marbordo kun mia lernantino. Kaj tuj poste oni disdonis al ni la demandojn.


Tre plezurigis min, ke ĉe ĉiu tablo sidas du kandidatoj. Dum la unua horo mi povis do facile kopii sur miajn respondfoliojn la solvojn trovitajn de mia cerbumanta najbarino: F-B-A-J-D-I-E-C-H-G, ktp. Jen vere ripoziga ekzameno! Tamen iomete mirigis min, ke la koloro de ŝiaj demandfolioj ne vere similas al tiu de miaj. Unue mi supozis, ke unu koloro estas vira, kaj la alia virina... Poste mi rimarkis, ke la respondoj F-B-A-J-D-I-E-C-H-G sufiĉas por plenigi la unuan respondtabelon de mia najbarino, dum restas du vakaj ĉeloj en mia propra respondtabelo. Mi do vokis responsulon, kaj energie plendis, ke miaj respondtabeloj estas pli grandaj ol tiuj de mia najbarino. Li silente montris per fingro la supran parton de mia foliaro, kie mi legis: "C1". Nu,

mi ja sciis, ke mi trapasas la C1-ekzamenon! Sed tuj poste mi rigardis pli atente al la foliaro de mia najbarino, kaj ekvidis la jenan titolon: "B2". La responsulo silente ŝultrumis, kaj reiris al sia seĝo...

 Landon la 18-an de Junio niaj geklubanoj pridiskutis la organizon de la venontjaraj kursoj. Tre gravas, ke niaj kursoj plu okazu ĉiusemajne. Bedaŭrinde, niaj kutimaj geinstruantoj *Arlette kaj Edmond* ne plu povos instrui ĉiulunde. Tial *Nicole BÉCANT* kaj *Marianne DUNLOP* ofte anstataŭos ilin, kaj de tempo al tempo eĉ mi provos ne tro fuŝgvidi kelkajn kursojn. Krome ĉiuj sciis, ke post unu semajno ĉiuj lecionoj de "Pasporto al la tuta mondo" estos jam studitaj, do pluraj asocioj proponis diversajn ideojn koncerne la venontjaran laboron. Ni ĉiuj plu pripensus la temon dum la someraj ferioj...

 La 25-an de Junio, post la reviviĝo de viro, kiu estis nek mortinta nek prezidanto de la Akademio de Esperanto, plengorĝe kaj ĝojege kantis sur la ekrano de nia lernoĉambro la tuta familio Bonvolo. Tuj poste, ĉu por festi la reviviĝon, ĉu por bonvenigi la finon de la lernoĵaro, multaj geklubanoj kune kaj gaje vespermanĝis kaj vesper(t?/d?)rinkis en restoracio.

 Fine de Junio, du el miaj gelnantoj en *Nœux-les-Mines* (*Thierry kaj Fabrice*) alportis 120 subskribojn favore al "L'espéranto au bac!", kolektitajn jen en *Béthune* jen en *Isbergues*.

 Landon la 17-an de Septembro je la 18-a rekomenciĝos la Esperanto-kursoj en Araso. Tiuvespere ni ne nur salutos kaj brakumos unu la alian, sed tutcerte estos gajaj, ĉar *Arlette* solene promesis, ke ni spektos la filmon "Esperanto estas"! Tamen ni ankoraŭ ne scias, ĉu *Edmond* konsentos disdoni puŝmaizon...

Nia retejo:
<http://arras.esperanto-nord.org>

Nia adreso:
Office Culturel
61 Grand'Place
62000 ARRAS

Esperanto-kursoj:
– en Araso > lunde de la 18-a ĝis la
20-a (krom dum ferioj).
– en la MJC de Noeux-les-Mines >

jaŭde kaj vendrede de la 18-a ĝis la
20-a (krom dum Aŭgusto).

Raportas Jean **HENNEBERT**

El Araso

Esperanto: “Magia lingvo”

Transcendita de la pasio de *Michel DECHY*

Lastan vendredon, la festosalonego de Framécourt estis gastiganta iun el la famaj fakuloj pri Esperanto, invititan de “Sulkoj de Kulturo”. Utopio aŭ fantasma, tiu lingvo dezirata kiel tutmonda disrompilo de la lingvaj interpopolaj bariloj, daŭre stagnas en ia anonimeco. Dume, pere de Interreto, ĝi ĝuas konsiderindan vektoron.

Dummomente imagu! Iu lingvo sen gramatika escepto (Kio ŝajnas neebla al ni francoj) kaj sen ebleco de ortografiaj eraroj, en kiu la vortoj skribatas tiaj kiaj ili prononcatas. Vi ne kredas tion. Tamen tia lingvo ekzistas. Ĝi nomiĝas Esperanto.

La tradukinto de “Tinĉjo en Tibeto”

“Temas pri magia lingvo, eksterordinara. Ĝi ne estas lingvo adiciiva, sed ĝi estas multobligiva. Ĝi estas ege rapide lernebla. Dum unu monato, oni akiras tiom da rezultoj kiom en unu jaro (por la franca ekzemple)”.

Kun *Michel DECHY*, Esperanto ne povis eltrovi pli bonan ambasadoron. Antaŭa primatematika kaj pritenisa instruisto, li trasulkis la kvin kontinentojn kun sia filino teniŝĉampionino *Nathalie*. Esperanton li malkovris malfrue. “Mi ĝin malkovris, estante kvindekjara. Ĝi estas eksterordinara lingvo”. Kvazaŭa revelacio... Daŭre de kelkaj jaroj *M. DECHY* estiĝis unu el la specialistoj pri la temo. Interalie li estis unu el la kunigantoj de la alesperanta adaptado de “Tinĉjo en Tibeto” antaŭ sep jaroj. Cetere iun el siaj lastaj vojaĝoj li faris en Nepalon, kie disvolviĝas grava parto de la aventuroj de la heroo ŝatita de *Hergé*.

“Esperanto estas unu el la tujtujaj traduklingvoj de Google”

Michel DECHY bonvole respondas al iu demando ofte starigita pri la nombro de esperantoparolantoj: “Ni estas milionoj sur la kvin kontinentoj. Nu kompreneble unu el ili ne estas hazarde renkontebla ĉe iu strat-angulo, sed ni havas ĉie adresojn”. Kaj la preleganto rakontas multajn anekdotojn el Meksiko, el Ĉinio...

Michel DECHY estas disbolanta, li miksa niaregionajn humuron kaj homvarmecon. Eĉ se vi ja malofte ŝancois renkonti esperantiston en *Ternois*-lando, Esperanto trovis potencan vektoron, t.e. Interreto.

Sur la reto ĝi ja teksis fortikan teksaĵon. “Esperanto multe vivas sur Interreto. Ĉi-tiun ĝi estas eksplodiganta. Esperanto estas unu el la 60 tujtujaj traduklingvoj de Google” li eldiras kun fajreroj en la okuloj. La estontecon de “sia” lingvo li pri-kredas. “Ĝi estas mirinda pedagogia ilo; la infanoj esta nekredinde ricevemaj”... Sed la “Nacia Instruado” multe malpli ricevemas. Iu peticio estas naciskale cirkulanta, por konigi Esperanton kiel opcio en bakalaŭro. Ĝi kolektis pli ol 20 000 subskribojn... Kaj kelkajn kromajn vendredon vespere post la renkontiĝo...

A. H.

Ni ne povis fini, karaj legantoj de “La Abelo de *Ternois*-lando” ne citante la jenajn kelkajn vortojn, kiel dankojn al via fideleco, kun la amika kompileco de *Michel DECHY*: “Dankon pro via fidela ĉiusemajna legado”...

Artikolo aperinta
en “*L’Abeille de la Ternoise*”
de la 29-a de Marto 2012-04-02



Michel DECHY, preleganto ŝpruciganta humuron, sciis interesegi aŭskultantaron tre atentan. Esperanto ne povis eltrovi pli bonan ambasadoron.

elfrancigita al Esperanto
de *Claude LONGUE-ÉPÉE*

Noto de la tradukinto:

De la tutmonda esperantistaro *Michel DECHY* estas konata pro siaj eldonitaĵoj pri Tinĉjo, la juna hartufa reportero. Same de la tutmonda legantaro de nia Norda Gazeto *Michel DECHY* baldaŭ estos fame konata – vidu la tiurilatan artikolon en la *Lille*-a rubriko de nia junia numero – ankaŭ pro sia talento glitkuri sur la glatiso de la *Lille*-aj stratoj. Ankaŭ de la tutmonda sportemularo *Michel DECHY* estas fame konata delonge pro sia patreco de la teniŝĉampionino *Nathalie*.

Sed estas ankaŭ emfazinda la fam-eco, kiun akiris *Michel DECHY* en la neesperantista mondo pro sia entuziasmo klarioni la meritojn de

Esperanto. Tiu lia persistema entuziasmo multe kontribuadas al la diskonigo kaj al la disestimo al nia lingvo. La ĉi-supra traduko de la artikolo de iu regiona gazeto

amplekse atestas la efikon, kiun la multaj intervenoj de *Michel DECHY* ŝprucigas profite al nia movado.

Tial nia gazeto volas aperigi ĝin en

Esperanto... Kaj tiel diri al *Michel*: "Dankegon"!

Claude LONGUE-ÉPÉE

El Bulonjo

"Centre Pompidou" en Bulonjo-ĉe-Mar

Post *Cambrai*, la movebla "Centre Pompidou" instaligis en Bulonjo-ĉe-Mar je la 16a de Junio, kaj daŭros ĝis la 16a de Septembro.

Laŭ 16 verkegoj ni promenas en la koloreco; de la ruĝoj de *PICABIA* aŭ de *CADERE*, ĝis la flavoj de *KUPKA*, pasante antaŭ la bluoj de *PICASSO*; ni alvenas al la multkolora bovino de *Niki DESAINTE PHALLE*, kun ĝia amiko "la blindulo" tute grize vestita.

Eĉ se tiuj tri fundamentaj koloroj aperas puraj, intensaj, aŭ ellaboritaj

en ĉiuj eblaj nuancoj kaj kamajoj, ni forgesu nek la blankon nek la nigron. Ĉu tiuj estas koloroj aŭ ne koloroj?

Tiu demando estas ne por ni profanuloj, kiam ni vidas la tutajn eblecojn, kiujn tiuj du "koloroj" donacas en multe da grandaj produktaĵoj tiaj kiaj, ekzemple, la admirinda pentraĵo de *Fernand LÉGER* « La grandaj nigraj plonĝantoj"... (Plonĝantoj aŭ plonĝistoj)?

La vizito ne estas finita: kiam la koloro estas tie nur por si mem, de *Sonia*

DELAUNAY, Olafur ELIASSON, Yaacov AGAM, CALDER, kaj la aliaj... ludas inter si, aŭ kun la lumo, aŭ ankoraŭ kun la aero, la spaco kaj la movo.

Aliaj surprizoj, ne el la plej malgrandaj, atendas nin en tiu muzeeto!

Pri nia grupo: kvarope, ni kunvenas en amika etoso ĉiumerkrede.

Raportas *Renée* kaj la grupo de Bulonjo-ĉe-Mar

El Dunkirko

Agad-raporto el Dunkirko

La 27an de Junio 2012: okazis la 20-a ĝenerala membrokunveno de *Dunkerque-Espéranto*.

urbo ĝemeligita kun Dunkirko.

La 19an de Septembro 2012: okazos la informkunveno de *Dunkerque-Espéranto*.

La 30an de Junio 2012 / 1an de Julio 2012: kvar klubanoj vizitis esperantistojn de la klubo "Krefeld-Espéranto" (Germanio). *Krefeld* estas

La 17an kaj 18an de Novembro 2012: pluraj klub-

anoj partoprenos la 24an Renduon de *Stella-Plage*. *Jacques YVART* kantos okaze de la vespera spektaklo, sabaton vespere.

Raportas *Xavier VILAIN*

El Dunkirko

Dunkerque – Krefeld

Dunkirko estas oficiale ĝemeligita kun la germana urbo *Krefeld* de 1974. *Krefeld* situas en Nord-Rejnlando, tute proksime al *Duisburg* kaj al *Düsseldorf*.

En *Krefeld* estas Esperanto-asocio.

La esperantistaj asocioj de la du urboj havis rilatojn antaŭ kelkaj jaroj, sed tiuj rilatoj ĉesigis.

En 2012, ni sukcesis rekomenci tiujn amikajn rilatojn inter la esperantistoj de la du urboj. Kvar membroj de

Dunkerque-Espéranto veturis al *Krefeld* la 30an de Junio kaj la 1an de Julio. La prezidanto, *Xavier VILAIN*, la sekretariino, *Élise DEPLA*, *Édith* kaj *Daniel DAVID* partoprenis en tiu vojaĝo.

La esperantistoj de *Krefeld* varmege akceptis nin. *Rosa EBEL* kaj ŝiaj gemikoj preparis intereseĝan kaj riĉan programon. Ĉiuj partoprenis en la prezento de la vidindaĵoj.

La vizito de la urbo komenciĝis en la

stacidomo: impona konstruaĵo, kiu similas al la stacidomo de *Metz*. Ili ambaŭ estis konstruitaj laŭ la novromanika stilo en la unua jardeko de la 20-a jarcento, kiam reĝis la imperiestro Vilhelmo la 2-a.

Ni admiris, sur placeto, belan statuon de muzikanto, kiu ludas bandonion. Bandonio estas muzikinstrumento, nun ĉefe uzata por la muziko de tango. Oni povas pensi, ke la vorto "bandonio" venas de iu bendo aŭ de

iu bando. Ne, la nomo venis de *Heinrich BAND*, kiu loĝis en *Krefeld* kaj inventis tiun instrumenton en la jaroj 1840.



Grupo de geesperantistoj

La monumento de **PONZELAR** prezentas silkteksiston. La teksado de la silko estis grava industrio de la urbo. La fontano de la pupoj estas mirinda por siaj artikitaj skulptaĵoj el metalo. Ni vizitis ankaŭ la preĝejon de la

menonitoj. La menonitoj baptas nur la plenkreskulojn kaj estas pacifistoj: ili rifuzas la militservon. Tiu protestanta eklezio ekzistas ekde la 16-a jarcento. La menonitoj estas proksimume 800 en *Krefeld*.

Ni tagmanĝis en agrabla restoracio, kie ni povis pli longe konversacii kun la germanaj esperantistoj: *Rosa, Waldemar, Mia, Ingrid, Jolien, Markus* kaj *Lars*.

Post la manĝo, ni vizitis plu la urbon. Ni vidis la belegan teatron, kie ni konatiĝis kun *Andrea*, la juna prezidantino de la Esperanto-asocio. Ni profitis interesan stratofeston kun turkaj dancoj, irlandaj kantoj, koncerto de klasika muziko...

Ni veturis per tramo al *Linn*, kvartalo de la urbo, kie oni povas admiri interesan kastelon de la 13-a jarcento kaj malnovajn stratojn kun beletaj domoj.

Revenintaj en la urbocentro, ni malkovris la katolikan preĝejon, Sankta Denizo kaj aliajn aspektojn de la urbo. Mirigitaj de tiu kompleta vizito,

sed iom lacaj, ni ŝatis sidiĝi ĉe antaŭkafejo por gustumi junajn haringojn kiujn oni nomas tie *matjes* kaj bieron faritan en la kelo de la kafejo mem.

La dimanĉon, *Waldemar EBEL* kondukis nin en verda kvartalo de la urbo por agrabla promenado tra avenuoj kun belegaj domoj.

Kvankam la urbo situas en industria regiono, ĝi estas gajaspekta kun multaj arboj, herbobedoj kaj parkoj. Poste, ni festenis en la ĝardeno de *Mia BÖHMER*. Ni longe babiladis kaj povis tiel pli bone konatiĝi kun la esperantistoj de nia ĝemeligita urbo kaj kun *Franz-Paul*, esperantisto, kiu venis el *KEVELAER*, apud la Nederlanda landlimo por renkonti nin. Sed ni devis rehejmeniri, ni forlasis niajn gastigantojn, esperante baldaŭ revidi ilin, en Dunkirko.

Raportas **Xavier VILAIN**

El Lille-Villeneuve-Esperanto > METROPOLO

Agad-raporto el Lille

Ĉiusemajnaj kursoj

– Universitato **Lille III**: ĉiun mardon de la 18a 15 ĝis la 19a 45 por komencantoj, kaj dufoje monate lunde je la sama horo por praktikantoj (*M.D.*).

– Kvartala Domo en la centro de **Lille**: ĉiun mardon por komencantoj, je la sama horo (*K.B.*).

– *Bersée*: ĉiun lundon je la sama horo (18a 15) por komencantoj (*C.L.E.*).

Budoj

Festivalo de la Lingvoj en la Universitato Lille III: la 28an kaj la 29an de Septembro.

Foiro de Asocioj en la Sporthalo Palladium en Villeneuve: la 9an de Septembro.

Salono de la verkistoj kaj de la kolektantoj en la salono *Concorde*

de *Villeneuve-d'Ascq*: la 18an de Novembro.

Festivalo de la Bildstrioj en *Lys-les-Lannoy*: la 10an kaj la 11an de Novembro 2012.

FEI-Ekzamenoj (nivelo I kaj II)

dimanĉon la 24an de Junio en la **MRES** de **Lille**, sed ĉijare, pro diversaj kialoj (KER-ekzamenoj, sanproblemoj, transloĝiĝo de kandidatoj...) estis nur unu kandidato por ĉiu nivelo.

Renkontoj kun la Konkordo de Kortrejko

Denove, post eta endormiĝo, okazos ĝemela renkontiĝo de niaj du kluboj LVEo kaj La Konkordo de Kortrejko. Niaj amikoj organizos komunan boatadon, la 30an de Septembro.

Partoprenoj en diversaj aranĝoj

Claude LONGUE-ÉPÉE kaj lia ĉarma edzino *Francine* partoprenis la UKon en Hanojo, verŝajne ni multe frandos la venontan raporton...

Lille 2015, eventuala UK

La 16an de Julio, *Julia HEDOUX*, *Xavier DEWIDEHEM* kaj *Michel DECHY* akceptis kaj ĉiĉeronis du delegitojn de UEA *Osmo BULLER* kaj *Clay MAGALHES*, kiuj respondas pri la organizado de la diversaj UKoj. Dank' al la lokaj turismaj kaj urbaj instancoj, ni esperas ke la kvalitoj de "niaj urbo kaj norda regiono" aperos ankaŭ por la delegitoj kaj instancoj de UEA...

Raportis **Michel DECHY**

La prelego de Roman DOBRZYNSKI pri "Bona Espero"

Multaj samideanoj jam havis okazon legi, ĉu en la Esperanta originalaĵo, ĉu en la franclingva tradukitaĵo, "La ZAMENHOF-Strato". La libro estas verkita laŭ raporto de konversacioj kun "la Nepo" ZALESKI-ZAMENHOF gvidataj de la pola aŭtoro Roman DOBRZYNSKI. Mi persone havis la privilegion kaj la fieron esti membro – kiel inter aliaj "nia" Pascal VILAIN – de la teamo, kiu sub la gvidado de Ginette MARTIN tradukis la verkon francalingven.

Same kelkiuj aĉetis la libron "Bona Espero". Ankaŭ ĝi estas verkita de Roman DOBRZYNSKI laŭ ties kontaktoj kaj vizitoj en la fama Brazilia edukejo gvidata de la paro GRATTAPAGLIA.

Nia grupo de Lille-Villeneuve, la 8-an de Majo 2012 vespere je la 19-a horo, havis la honoron kaj ĝojon akcepti Roman DOBRZYNSKI en salono de MRES, por aŭskulti lin paroli pri tiu Brazilia Esperantujero "Bona Espero". Tio okazis kadre de prelegvojaĝo, kiu ekde la 9-a de Majo kondukos nian polan samideanon en Parizon antaŭ aliaj urboj. Li alvenis en Lille la 7-an de Majo kaj estis gastigata – kiel volas la nuna kutimo – ĉe nia amikino Katja BOEN, kiun ni tutkore dankas. Mi bedaŭras, ke mi ne povis gvidi nian amikon en vizito de famaj kvartaloj de Lille, pri kiuj mi fariĝis preskaŭ spertulo. Sed mi trankviliĝas, sciante ke niaj fidelaj legantoj nun tiom spertas kiom mi pri la "Flandra Ĉefurbo" danke al nia Norda Gazeto kaj al miaj du sinsekvaj artikoloj verkitaĵoj okaze de la vizitoj de Trevor STEELE kaj de Mikaelo BRONŝTEJN...

Mardon vespere en MRES, sinprezento de la intervenantoj

Ĉeestas, krom la preleganto, dudek-unu esperantistoj de Lille-Villeneuve kaj de Araso. Ĉiuj estas "samide-

anoj", sed inter ili estas tri aŭ kvar ne-esperantoparolantoj.

La prezidanto Michel dankas al Roman kiu prelegos, al Katja kiu estas lin gastiganta, al Edmond kaj Arlette, kiuj venis de Araso kaj alportis la necesan materialon por la projekciado de filmo pri "Bona Espero". Katja prezentas la du librojn de Roman pri "La ZAMENHOF-Strato" kaj "Bona Espero"; klarigante, kial Roman bone spertiĝis pri tiu edukejo "Bona Espero", kaj kial nia grupo elektis tiun-ĉi temon kiel bazon de la prelego.



Roman DOBRZYNSKI en Majo 2008.
Fotis: Yves NEVELSTEEN

Roman esprimas sian ĝojon esti inter ni. Li ŝerce priripročas la francajn esperantistojn, kiuj "tro bone kaj konstante elparolas Esperanton" kaj tial ne ebligis al li spertiĝi pri la franca lingvo de li studita en lernejo. Li tamen agnoskas, ke iamaj pasintaj intervenoj kaj invitoj de francaj esperantistoj – de li ne konataj! – kunigis la necesajn kondiĉojn por havigi al li la francan vizon por eniri, viziti kaj trabcikli nian landon, por iri al Hispanio.

Li klarigas, ke li laboris en la pola televido. Li havis okazojn viziti la latinajn Amerikajn landojn, inter kiuj Brazilon, pri kiu li faris kvin filmojn. Ĉiuj estas en Esperanto. Al la nuna ĉefurbo Braziljo estas proksima la Esperanta edukejo "Bona Espero" – proksima ĉiukaze laŭ la Brazilia skalo!! – Tien iri li estis invitita en

2007, okaze de la 50-jariĝo de la edukejo.

Lia vizito naskis al li gravan entuziasmon, kiu lin instigis verki la libron "Bona Espero".

Kaj li surekranigas por ni, atentemaj spektantoj, filmon registritan en la edukejo okaze de jarfinaj festoj, kun komentoj – kaj dialogoj – en Esperanto.

Spektado de la filmo pri "Bona Espero"

Enkondukas la filmon bildoj de lokaj pejzaĝoj kun montoj kaj nuboj kolorigitaj de la sunradioj. Tio ja estas naturaj vidindaĵoj de altebenaĵoj de Brazilo. La filmo poste montras, ke tiuj pejzaĝoj, aspekte malfekundaj, iom post iom kaj per la efiko de la aktivado de Bona Espero, kovriĝis per arboj, fruktoarboj, herbejoj kaj ĝardenoj, kies fruktoj, floroj kaj legomoj estas zorge kultivataj, plukataj kaj konsumataj de la junaj – kaj malpli junaj – loĝantoj de Bona Espero. La filmo montras lagon, sur kies bordoj kreskas multaj floroj; kaj ĝi montras vivplenajn akvofalojn, kies akvo esta inteligente utiligata por fekundigi antaŭe senutilajn terojn.

Ni povas observi similan procezon de la evoluo de la homa vivo en la bieno. La komentoj klarigas ke, antaŭ la kreado de Bona Espero, la nunaj geknaboj kiuj vivas tie – kaj la nunaj adoltoj kiuj revenas viziti la lokojn kie ili estis edukataj – estis iamaj estaĵoj de siaj gepatroj batitaj kaj forĵetitaj al neeviteblaj seninstruoco, miskonduteco kaj ĉiuspecaj ŝteloj, deliktoj... Kaj malfeliĉoj... Nun ni vidas infanojn tute transformitajn, ĝojplenajn, ludemajn, ĝentilajn, afablajn, kiuj ĝojas, kiel iuj ajn normalaj samaĝaj infanoj, ricevi donacojn kaj ludi per pupoj kaj pilkoj.

Antaŭ la multnombraj filantropoj – ofte eksdukitoj de Bona Espero, sed ankaŭ bonfaruloj de Brazilo aŭ de Eŭropo (notinde de Germanio) – venintaj por fari la donacojn okaze de

la jarfinaj festoj, la geknaboj donas spektaklon de dancoj, kantoj kaj teatraĵoj. Tiu spektaklo de vera feliĉo igas la veteranojn siavice korse prikanti sian ĝojon.

La infanoj, en la filmo, tre lerte sin esprimas en Esperanto... Tiel lerte, ke mi iom pensis, ke iliaj frazoj estis parkere nekompreneble lernitaj. Sed *Roman* precizigas, ke ili fakte ne sekvis kursojn de Esperanto. Ili reale kaj tutsimple estis, ekde siaj alvenoj en Bona Espero (dum ili praktike plej ofte ne kapablis sin esprimi) alparolitaj, edukitaj kaj instruitaj senpere en Esperanto!...

Komentoj pri la filmo farataj de Roman DOBRZYNSKI

La filmo montras du monumentojn, kiuj ornamas Bonan Esperon kaj klarigas ties fundamentajn celojn. Estas unue, sur altaj kolonoj, la busto de *ZAMENHOF*, la geniulo de Esperanto. Estas due, sur same alta kolono, kvinpinta stelo, la simbolo de Esperanto; ĝi estis starigita de japanoj memore al Hiroŝimo, kaj sur la kolono estas surskribitaĵo: "Paco regu la mondon".

Roman prezentas la geedzojn *GRATTAPAGLIA*, kiuj sin plene dediĉis, kaj daŭre sin dediĉas, al la afero de "Bona Espero". Ili kreis, el analfabetaj, senedukaj, senfamiliaj infanoj, feliĉajn geknabojn feliĉe vivantajn en granda familio.

Kune kun sindonema estraro ili disciplinigis la akvon de akvofaloj kaj la bonvenan pluvsezonon por fekundigi teron antaŭe kondamnitan al la sekeco. Ili kreis novajn kultivojn laŭ ekologiaj principoj. La fruktoarboj montritaj de la filmo ja naskiĝis ekde la kreado de la edukejo, kie nun estiĝas multaj marmeladoj!...

Roman konkludas la filmon, emfazante ke venis helpi multaj volontuloj esperantistoj, kaj ke li deziras "Bonvenon al la venontaj novaj 50 jaroj de Bona Espero".

Kromaj klarigoj de Roman, aŭtoro de la libro "Bona Espero"

Roman ne diris tion; sed mi kredas,

ke la plej efika rimedo, por ĉion scii estas aĉeti kaj legi lian libron.

Li komentis kelkajn jenajn detalojn.

La libro estas verkita laŭ formo de dialogo... Kio fakte neniel okazis!!... Same estas por "La Strato *ZAMENHOF*", per dialogo kun *ZALESKI-ZAMENHOF*... Kvankam estis tre mal-facile ĉi-tiun paroligi. Fakte vekigis lia memoro, kiam estis aludita, okaze de la elvokado pri la elmigrado de multaj poloj kaj pri ties vizito al la papo ("papero" laŭ ekkrio de infaneto!...), la miriga ekzisto de katolika paroĥo meze de la dumilita geto de Varsovio!... Alvenis la familio *GRATTAPAGLIA* en 1974. Tiam estis en la edukejo kvardeko da infanoj, deliktuloj ĝenerale eltiritaj el malliberejoj.

Antaŭe ne estis lernejoj en la regiono. Tiu regiono apartenis al unu familio, devenanta de iu pola generalo de Napoleono la 1-a – *Viktor CZERWINSKI* –, kiu estis organizanta la Brazilan armeon, kaj kiu ricevis de Pedro la 1-a rekompence 3 500 km² da tereno en la regiono!... La familio, kiu faris nenion el tiu tereno, donis siatempe 1000 ha (dufoje 500 ha) por Bona Espero.

Ĝis la veno de *Ursula GRATTAPAGLIA* kaj de ŝia edzo *Giuseppe*, por nutri la infanojn estis nek mono nek legomoj, estis nur rizo kaj nigraj fazeoloj... *Ursula* alportis la panon!...

Nun estas tie edukataj 30/40 infanoj, antaŭe mistraktitaj, inter kiuj junaj knabinoj sekse perfortitaj, kaj kies gepatroj restas en malliberejoj. Fakte familioj – "tradiciaj familioj" kiaj ni kutime imagas – ne ekzistas... Sed *Ursula* maljuniĝas kaj ŝi ne plu povos zorgi pri infanoj pli aĝaj ol dekdu jarojn...

Ja la estonteco starigas problemojn!... Fakte ĉiu infano konsistigas apartan problemon.

La espero kuŝas en 42-jara virino, eksbebo miszorgita kaj ĵetita de la patrino tra aŭtofenestro sur la genuojn de *Ursula*!... Ŝi fakte bone progresis kaj fine fariĝis unu el la estrinoj de la edukejo. Ŝi naskis infanon kaj edziniĝis kun iu italo, kiu ne estas esperantisto

sed kiu ŝajne donis taŭgan impeton al la afero...

Okazis antaŭ kelkaj monatoj sufiĉe grava brulego en "Bona Espero".

Ĝi estis sufokita de la loĝantoj, sen tro multaj difektoj ĉe la ĉirkaŭbariloj de la bieno.

Cetere, post la fajro kaj brulo de sekigintaj herboj la tero despli rapide refekundiĝas...

Danĝero ne estis en la fajro, sed ĝi estas en la homoj, kiuj ŝatus ŝtelloĝi sur tiuj fekundaj teroj, preskaŭ "senhomaj".

Tiel finiĝas, je la 20-a h.30, la interesege prelego de *Roman DOBRZYNSKI*, kiu seninterrompe vekis la atenton, kiu estas abunde aplaŭdita kaj kiu daŭrigas kelkajn kromajn konversaciojn en la salono kaj en la koridoroj.

Fino de la kunveno en komuna vespermanĝo

Dekduo da geamikoj invitis la preleginton en nia kutima Magreba restoracio, por manĝi kutimajn plad-ojn el kuskusoj kaj "Tajines"... kiujn mi persone frandas, kvankam mi daŭre ne jam trovis ilian tradukon al Esperanto...

Reportis *Claude LONGUE-EPÉE*
en Majo 2012

El Valencieno

Agad-raporto el Valencieno

Translima renkontiĝo

Sabaton la 23an de Junio okazis la 36a jara renkontiĝo de la grupoj Valencieno kaj *Solre-sur-Sambre*. Ni estis 22 geamikoj el *Solre-sur-Sambre*, *Trélon*, *Mons* kaj Valencieno. Ni pasigis agrablan momenton en la restoracio "Le Verger Tellier" en *Le Quesnoy*.

Reportis *Jean-Marc FRATARD*

Granda vojaĝo

Tag-libro pri Ĉinio (dua parto)

La novjara ĉina festo



Ĉi-jare, la novjara festo okazas sabaton la 21an kaj dimanĉon la 22an de Januaro. Tiu ĉi festo respegulas por ni niajn du finjarajn festojn, Kristnaskon kaj Novjaron. La ĉinoj festas en familio tiun eventon, kiu havas esencan signifon en la ĉina socio.

Ekde nia alveno en *Haikou*, ni estas mirigataj de la koloroj, kiuj ornamas la urbon kaj la tutan insulon. La ruĝa koloro ĉefas, ĝi simbolas feliĉon kaj pacon. Ĉie sur la stratoj kaj en la parkoj estas ruĝaj lanternoj, brilaj vendejoj iom kiĉaj, kie eblas aĉeti dekoraciojn por la domo, bondezirajn poŝtkartojn, kaligrafitajn kakemonojn, kiujn oni pendigas sur la sojlo de la domo ambaŭflanke de la enirpordo. Dumnokte, kelkfoje eĉ dumtage, petardoj eksplodas ie ajn. Sabaton la 21an de Januaro, la vendejoj plenplenas je homoj, kiel en Eŭropo je la lasta tago de la jaro.

Antaŭ la kolorplena butikoj de la novjaraj ornamaĵoj la popolo amasiĝas. Apenaŭ eblas preterpasi sur la trotuaro. *Edmond* sin igas fotografata kun sinjorino elegante vestita, kiu ŝajnas jam preta festadi.

La festomanĝo tre frue komenciĝas, je la 18-a horo, post la fotado de la grupo en kiu ni ĉiuj kuniĝas. Studentoj kaj instruantoj, ĉiuj kune manĝas diversajn tre bongustajn pladojn: legomojn, fiŝojn, viandon; ĉio tre bongustas, malgraŭ ke nur escepte ni trinkas bieron por tintigi la glasojn je la veno de la nova jaro, malgraŭ ke ni estas pli ol cent personoj en malgranda restoracia salono, malgraŭ ke la gejunuloj

trinkas multe da biero kaj treege bruas; estas nek kantoj, nek muziko, nek danco; kaj, kiel ĉiam, tiu manĝo ne daŭras, kiel ĉiam ne estas deserto! La ĉinoj ne restas ĉetabile, ili rapidege manĝas kaj, eĉ je tiu vespero, la festo rapide finiĝas...

Ni ne iros promeni laŭ la stratoj ĉi-vespere, ni timas la eksplodojn de petardoj, kiuj pli kaj pli furiozas. Kaj, tial ke morgaŭ ni foriros por tritaga ekskurso, ni finas la vesperfeston en nia ĉambro kun kelkaj geamikoj kaj ni enlitiĝas ne tro malfrue.

En la tuta insulo estas artaj fajraĵoj, raketoj kaj petardeksplodoj, kiuj daŭros dum ankoraŭ pli ol ok tagoj. La noktoj estas tre bruaj kaj la tagoj estas dormemaj. Post la festo, dum pli ol unu semajno estas la ferio por ĈIUJ, la tuta socio vivas lantmove: minimumo da butikoj malfermitaj, malmulte da trafiko sur la stratoj, neniu taksibiciklo, neniu frukto-vendisto sur la trotuaroj. Ni bedaŭras la viglecon, kiu regis la urbon antaŭ la festo; la urbo ŝajnas malgaja. Feliĉe, dum la sekvanta semajno, iom post iom ĉiuj vendejoj remalfermiĝos kaj la vigleco renaskiĝos!

Oni alkutimiĝas al ĉio: malgraŭ la nokta bruo igita de eksplodoj de petardoj, mi nun sukcesas ekdormi sen miaj "Quiès" oreŝtopiloj, kiuj komencis dolorigi miajn orelojn.

Kial ĉiuj tiuj eksplodoj de raketoj kaj de petardoj okazantaj ĉie, ĉe la elirejoj de la hoteloj, de la domegoj, de la dometoj, kiuj povas daŭri unu monaton antaŭ kaj post la festo, pliintensigante antaŭe kaj malpliintensigante poste? Ne nur por la plezuro de la okuloj, kiel en Francio kiam okazas piroteknikaĵo; sed fundamente por forpeli ĉiujn aĉaĵojn, kiuj povus naskiĝi en la familio, por malaperigi ĉiujn "fidemonojn"...

Kial ne?!...

Hieraŭ, Lundon la 6-an de Februaro, la novjara periodo oficiale finiĝas per la tiel nomata festo de la lanternoj. Je

ENHAVO

NIAJ MEMBROJ VERKANTAS

- ★ Tag-libro pri Ĉinio (dua parto) p10
- ★ Peticio por Esperanto p13
- ★ Kiu estis tiu maljunulino? p14
- ★ UK en Hanojo p14
- ★ Ne! Nuklea elraditeco ne estas kontraŭa! p16
- ★ 31-a nacia Kongreso de la "naturamikoj" p17
- ★ Desegno kaj tradukoj p18
- ★ Mallongaĵoj – Kompilitaj de Lucien GILOTEAUX p19
- ★ Atentigo de la redaktoro p20
- ★ Asociaj kaj redakciaj informoj p20

tiu tago denove la vendejoj, la sur-trotuaraj fruktobudoj fermiĝas multe pli frue ĉirkaŭ la 19-a horo; kutime ĉio malfermatas ĝis la 23-a horo, se ne pli malfrue por iuj vendejoj. Ĉi tie oni vivas dumnokte, kaj ankaŭ dumtage; kiam riĝozas ĉinoj?...

Denove tiun vesperon la urbo eksplodas per raketoj; dum la tuta nokto ili eksplodas de ĉie, estas la adoltoj kiuj pafas ilin, sed ankaŭ la knaboj; ni miras kaj demandas nin, ĉu ne estas tro multe da akcidentoj (kiam oni pensas pri la reglamentaro reganta ĉe ni!).

La vetero de tiu lundo estis belega: blua ĉielo ekde la mateno, 27°C, vespere la plenluno prilumas la ĉielon. Nia grupo de ĉinaj studentoj preparas por ni la feston de la lanternoj.

Neĝeta estas ĉina esperantistino, edziniĝinta kun *Michel*, franco de *Bourg-en-Bresse* (*Michel* loĝas nun definitive en Ĉinio, li ekkonis Neĝetaron antaŭ sep jaroj okaze de Esperanta kongreso en Pekino). Neĝeta organizas la programon de tiu festo laŭ maniero spontana kaj tre malstreĉita, sed tre efika. Ni travivas neforgeseblan momenton. Ni estas grupo de dek gefrancoj. La programon de la vespero komencas franca kanzono de ni kune kantata laŭ du tonoj: "Ĉe la hela fontano"; ni estas aplaŭdataj. Postvenos aliaj kantoj en aliaj lingvoj kaj en Esperanto. Neĝeta

organizas tre amuzajn ludojn, notinde iun konkurson inter tri teamoj: pleniĝi bokalon el ternukoŝoj prenitaĵ per manĝstangoj. Ĉar mi progresas, mi ne malbone elturniĝas!... Ni multe ridas!...

Unu el la plej kortuŝaj momentoj estas la parolado de *Humeiha* (posttagmeze mi estis ŝin helpanta, ĝin korektante). *Humeiha* elvokas iun ĉinan esperantiston, hodiaŭ mortintan, kiu ŝin helpis kaj kuraĝigis en ŝia lernado de Esperanto. Ŝi gratulas la ĉinajn studentojn pro ilia fervoro, kaj ŝi rekompence donacas al ĉiu en ruĝa kaj orumita koverto po cent juanojn, por ke ili povu aĉeti Esperantajn librojn kaj vortarojn (la koverto ruĝaj, simbolo de feliĉeco, kun mondonaco estas parto de la novjara tradicio). Ŝi ankaŭ dankas ĉiujn el la Eŭropanoj, kiuj venis de tiel malproksime, por helpi ilin kaj perfektigi la lingvokonon. Pere de niaj ĉinaj studentoj ŝi donacas al ĉiu inter ni belan rozon. Ŝi finas sian paroladon dirante, ke hodiaŭ estas por ŝi la plej bela festo de la lanternoj iam ajn travivata.

Dum tiu restado ni travivas momentojn de feliĉo kaj de sufero. Dum kurso de *Katalin*, aŭdinte *Sylvain* (ŝian edzon) kanti "Hundo estas bona besto, dimanĉo estas festo...", ni havas la ideon serĉimiti tiun kanzonon per rakonto de la travivataj eventoj. Mi estas komponanta tiun kanzonon de kelkaj tagoj kun *Fejfi* (slovako) kaj *Andre* (hungaro). Ni prezentas tiun "Himnon al la Esperanta Insulo" kaj ni havas gravan sukceson! Tiu himno finfermos tiun verkitan raporton...

La vespero finiĝas per iu admirinda momento de poezio: Neĝeta kaj *Michel* aĉetis ok dikajn lanternojn el silkpapero, ĉiu el ni skribas deziron, kies realiĝo estas esperita dum la jaro. Sur la korto de la universitato estas ekbruligita kandelo troviĝanta en ĉiu lanterno, kaj ĉiu ekflugas en la stelplanen ĉielon, lumitan de la plenluno, de la steloj kaj de la raketoj de ĉie fuzantaj. Ni sentas la emocijon kaj la feliĉon de la junaj ĉinoj, feliĉaj partigi kun ni siajn tradiciojn. Ili nin brakumas kaj ni interŝanĝas multe da emocio: magia momento, kiu al ni pli

intense konsciigas tiun miraklon, kiu estas Esperanto!...

Reveninte en la hotelon, ni tintigas niajn glasojn al la fino de la ĉina novjaro antaŭ bona malvarmeta biero... Tre malofta momento de ni alte taksata!...

Niaj ekskurso Dimanĉon la 22-an de Januaro

Ni forvojaĝas por tri tagoj al la insula sudo; la antaŭan vesperon ni festis la ĉinan novjaron ĉe nia hotelo.

Je la 8-a matene ni forlasas *Haikou*-on. Nebulas kaj pluvetas, mildas la vetero sed oni apenaŭ vidas la ĉirkaŭaĵon. Ni veturas laŭ la alsuda aŭtoŝoseo kaj haltas unue en la urbo *Bo'ao*. Ĉiujare en Aprilo okazas en tiu riĉa urbo priekonomia forumo kun reprezentantoj de la Aziaj landoj. Unu belas veturiloj, riĉaj golfludantoj, nun sunas, estas agrable!



Ni enŝipiĝas por viziti apudan etan insulon. Denove nebulas, kaj forte ventas: la vetero ofte ŝanĝiĝas, kaj neniam la suno daŭre brilas. La insuleto povus esti plaĉa pro siaj kokosarboj, sia flava sablo, kaj siaj oceanaj ondegoj, sed al ni Eŭropanoj io aspektas terure: je nia alveno, dekoj da bruegaj kvarradaj motorcikloj kun gasoĵa odoraco sturmas nin por proponi viziton de la insulo. Meze de la strando estas granda subĉiela bazaro, ĉio vendiĝas: fruktoj, vestaĵoj, ĉapoj, ŝuoj. Ĉinaj virinoj promenas kun grandaj testudoj, aŭ etaj krokodiloj ĉebrate, igas nin karesi ilin (kompatindaj bestoj, kiuj sopiras eniri akvon!), la homoj ariĝas, ĉie oni bruegas, oni tute ne sentas sin sur romantika insulo, kiel antaŭe anoncis al ni la gvidanto.

Kun plezuro post perŝipa reiro, ni daŭrigas nian perbusan vojaĝon ĝis

la unua hotelo, kie ni tranoktos. Ĝi estas luksa, ni deponas niajn pakajojn, kaj post bongusta ĉina manĝaĵo prezentita sur ronda turniĝanta tabulo kun 15 malsamaj pladoj, mirinda malstreĉiga sperto atendas nin en la hotelo.

En la granda naĝejo kun varma akvo (29°) estas varmega fontano (60°), ni spertas frenezigan plezuron malstreĉiĝi en varma akvo dum pli ol unu horo, ĉu naĝante, ĉu babilante kun amikoj, masaĝante niajn piedojn unu al la aliaj. **KIA PLEZURO!**

Ni sufiĉe bone dormas malgraŭ senĉesa bruo de piroteknikaĵoj kaj petardoj, kiuj eksplodas preskaŭ la tutan nokton!

La morgaŭon ni forveturas ĝis la unua halto en plantejo kaj fabriko de kafo. Interesa vizito, oni multe gustumas senpage kafon, kakaon, ĉokoladojn, kokoso-lakton (bongustegan!), biskvitojn, bombonojn... Antaŭ ol foriri, oni devige trairas enorman magazeton organizitan kiel la *IKEA*-magazeton en Eŭropo, kaj tie oni vendas ĉion. Kompreneble, oni ne rezistas al la tento aĉeti ĉion, kion oni gustumis, post duonhoro oni alvenas ĉe la kason kaj preskaŭ ĉiuj eliras kun aĉetaĵoj: kafo, teo, kokoso-lakto, ĉokolado..., kiujn oni frandos ĉu duope, ĉu kune dum la sekvo de nia restado.

Sur la insulo Hajnano vivas pli ol tridek minoritataj etnoj, inter kiuj la *LI* kaj la *MIAO*. Ni haltas en etnologia muzeo, kiu montras la evoluon kaj la vivmanieron de tiuj du gravaj minoritatoj. Gaja popolo akceptas nin, ili estas artistoj, muzikistoj, dancistoj, ili transdonas al la vizitantoj energion, vivigojn, ili surhavas mirindajn kostumojn, ni kun ili faros belajn fotojn, ni travivas bonegan momenton: ni kantas, dancas kun ili, ili ŝminkas nin, *Edmond* sursceniĝas kaj ludas tamtamon kun ili!

Foriro al *Sanya*, la insula perlo, kiu situas tute sude; survoje ni vizitas fabrikon de elperlaj juveloj, oni klarigas al ni kiel kreskas fajnaj perloj, tie ni pasigas mallongan tempon en la butikoj, indas diri ke la prezoj ne allogas, kaj *Edmond* ne hezitas komprenigi al mi, ke neniu vidus

diferencon inter falsaj perloj kaj veraj, mi ekscias, ke mi ne ekhavos mian kolĉenon el fajnaj perloj!

Ni alvenas en *Sanya*-on, famkonatan pro siaj longaj plaĝoj el blanka sablo kun kokosarboj, pro siaj golfetoj, pro siaj hoteloj por riĉuloj. La buso lasas nin apud la tre fama golfeto *Yalong*, restas al ni du horoj por promeni, ni hastas por vidi tiujn revigajn plaĝojn. Varmas en *Sanya*, 5 aŭ 6° pli ol en *Haikou*, sed la suno estas timida kaj la strando estas plenplena je homoj, preskaŭ neblas foti. Ni esperas, ke morgaŭ matene ni pli aprezos la pejzaĝon, ĉar estas planite foriri frue por profiti longan tempon ĉe la maro. Tiun vesperon en nia hotelo, ege granda kaj luksa, ni tute ne dormos, tiel bruemaj estas la ĉinoj kaj tiel eksplodas la ĉina novjaro per piroteknikaj kaj petardoj!

La morgaŭan matenon ni veturas laŭ kilometroj da blanksablaj plaĝoj, borditaj de parkoj, kie ĉinoj kuras kaj praktikas siajn defendartojn. Ne estas multe da personoj sur la strandoj, sed oni ne haltigas la buson: nia gvidanto klarigas, ke ni veturos al eta paradizo, kie ni povos bani nin! Oni enŝipigas nin okope en motorŝipetoj, kiuj ege rapide veturas super la akvo, la maro iom moviĝas, la vetero belas... kaj jen ni sur insulo por riĉuloj, kie, denove, ni iom post iom konscias, ke ĉio estas artefarita. Felice, ni alvenis frue kaj ankoraŭ ne estas tro da homoj, sed la ŝipetoj senĉese alvenas de la kontinento, kaj baldaŭ la insulo perdos ĉiujn ĉarmojn. Sed belas kaj varmas la vetero, oni sin banas en 21-grada akvo, sed en iu limigita areo, ĉirkaŭita per flusiloj, jes aliloke estas malpermesite sin bani! Kiel ni estus preferintaj bani nin kaj promeni sur la mirindaj strandoj, kiujn ni vidis ĉi-matene! Jen la plezuro de organizitaj vojaĝoj, kaj ni estas en Ĉinio, do neblas esti sendependaj kaj forlasi nian grupon. Ni komprenas, ke la ĉinoj ne havas la saman percepton kiel ni, ke ili nur komencas disvolvi turismon kaj ŝatas ĉion, kio estas vantomontra.

La tagmanĝo laŭ la ĉina maniero estas ege bongusta; jam la reiro-

tempo alvenas, ni devas reveturi 300 kilometrojn inter *Sanya* kaj *Haikou*. Ni alvenas en *Haikou*-on ĉirkaŭ la 18-a, pluvas kaj malvarmas.

Dimanĉon la 29-an de Januaro

Ni ekskursas dum unu tago en la sudorienta parto de la insulo, 100 kilometrojn for de *Haikou*. Ni vizitas taoisman templaron en grandioza parko kies plantaro estas ege riĉa, denove nebulas, la kvalito de niaj fotoj ne estos kontentiga, bedaŭrinde. La vizito estas interesa, mi (*Arlette*) longe paŝas kun Ĝoja, korea esperantistino, en kvieta silento, kiu instigas al meditado. Ni supreniras multnombrajn ŝtupojn, sur pluraj ŝtupegoj staras etaj temploj; tio similas al la diversaj stacioj de Kristo sur la krucovojoj en nia katolika religio.

Alvenante supren ĉe la monto-pinto, ni estas laĉaj sed feliĉaj, ni bruligas incensbastonetojn kaj miras pri la fervoro de junaj ĉinoj, kiuj preĝas, kaj lasas oferaĵojn.

Josiane kaj *Daniel* kuniĝas al ni, ni mal-supreniras kvinope sekvante *Daniel*-on, kiu kondukas nin sur neprakteblaj padoj. Mi miras pri lia lerteco!

Bongustega tagmanĝo en restoracio: pli ol 10 plaĝoj kun variaj legomoj kaj nova semajno de sovaĝaj legomoj.

Sahed, irana esperantisto, kiu vivas en Ĉinio por komerci, aĉetas por ni kafon kun ĉokolada biskvito, estas plezure ricevi etan deserton! Dankon *Sahed*! Posttagmeze varmas, dum unu horo briĵas la suno, ni vizitas grandan farmbienon, kiu datumas de la komenco de la pasinta jarcento. Ĝi estis posedaĵo de riĉa familio, kiu komercis tre prospere pro Indonezio. Meze de palmarboj kaj kokosarboj estas rizkampoj kaj betelarboj, kies fruktojn oni maĉas por ricevi ĉu energion ĉu kvietecon. La plantaro ĉi tie belas kaj riĉas! Ni revenas al nia hotelo, vespere ni manĝas nur fruktojn, tio ebligas al mi preni tempon por verki nian raporton. Morgaŭ komenciĝos nova semajno de instruado...

Dimanĉon la 5-an de Februaro

Hodiaŭ estas tre varme, pli ol 25°C,

sed la suno restos timida dum la tuta tago. La hodiaŭa ekskurso estas la plej bela el la restado. *Spado*, nia gvidanto, diras al ni, ke la ĉinoj ŝatas la vizitadon de pejzaĝoj por la turismo artefaritaj (cetere tion ni povis konstati okaze de niaj antaŭaj vizitoj). *Spado* ekkonsciis, ke la Eŭropanoj ŝatas ĉirkaŭaĵojn pli naturajn. Hodiaŭ, vizitinte botanikan ĝardenon de kokosarboj, gustuminte kokoso-lakton kaj karnon de la kokoso-nuksoj, vorite de la moskitoj (Ha! Jes! Printempo estas, oni sensas ĝin, estas pli varme, la tagoj plilongiĝas kaj la moskitoj aperas!), ni veturas per pramo, kiu portas busojn kaj aliajn veturilojn al duoninsulo; ni traveturas vilaĝeton de ĉarmaj fiŝkaptistoj meze de vastega tropika arbaro de diverspecaj kokosarboj.

Ni manĝas fiŝojn kaj markonkulojn ege bongustajn en restoracio.

Komence de la posttagmezo, en tiu vilaĝo de fiŝkaptistoj, du motorŝipoj neimageble kadukaj promenigas nin dum pli ol unu horo en iu mangrovo (tie, kie apartaj arbospecioj kreskas en akvo kun multaj aerradikoj). Mi filmas kaj fotas la ŝipon, kie troviĝas *Edmond*. Iam la stiranto havas multajn malfcilajojn restartigi sian ŝipon entokigitan sur malprofunda fundo.

Posttagmeze ni promenas laŭ poŝtkarteca strando, randita de kokosarboj; estas blanka sablo kaj varma maro; koraloj kaj ŝeloj amasiĝas sur la sablo. Feriejo kun etaj ligno-dometoj staras borde de la plaĝo. Estas malmulte da homoj! Ni prirervis tion komence de nia restado; ĉiu el ni sciigas al la gvidanto, ke tie estus ideala loko por organizi nian intensan seminarion de Esperanto-studado; vespere kiom estus agrable reviviĝi tie ĉe la bordo de la akvo! Des pli ke ni estas nur 80 kilometrojn for de *Haikou*.

Ni finas ĉi tiun ekskurson per vizito (tro rapida) de la malnova kvartalo de *Haikou*, estas monumentoj interesaj, sed kiuj meritus esti prizorgataj! Necesos, ke ni revenu alian tagon promeni en tiu kvartalo...

Fino de la dua parto

Verkita de *Arlette PLUTNIAK*
Daŭrigota en la venontaj numeroj

Agado por Esperanto

Peticio por Esperanto kiel laŭvola opcio en bakalaŭro

Instruado de esperanto en bazaj lernejoj kaj kolegioj

En Francio, jam de pli ol du jaroj, estis lanĉita kampanjo de subskribo por enkonduko de Esperanto inter la opciajn lingvojn de la ekzamenoj de bakalaŭro.

Tiu kampanjo, lanĉita kune de *Espéranto-France* kaj de SAT-Amikaro, obeas al “desuprismo” per agado kaj aginstigado al diversaj eminentuloj, ministroj, politikistoj, parlamentanoj kaj lokaj, departementaj kaj regionaj elektitoj. Ĝi obeas ankaŭ al “desubismo” per kolekto de subskriboj far niaj samideanoj ĉe iliaj parencoj, ĉe iliaj amikoj, ĉe ĉiuj civitanoj.

Cetere, en niaj Nordaj kaj Pikardaj regionoj, jam montriĝis tre efika kaj fruktodona nia kolekto de “desuprecaj” deklaroj kaj de “desubecaj” subskriboj.

Hodiaŭ estas novaj parlamentanoj, novaj ministroj kaj... ankoraŭ certe ne kontaktitaj simplaj subskribontoj. Ni reprenu niajn listojn kaj denove ni strebu kaj baraktu por rikolti favorajn subskribojn!...

Tiu franca “desupra” kaj “desuba” kampanjo estas fakte citita de diversaj esperantistaj instancoj kiel ekzemplo de sekvenda agado por la agnosko kaj la evoluo de la lingvo en la ŝtataj instruadaj kaj edukadaj medioj.

Sekve al tiu franca ekzemplo, iuj aliaj landaj Esperanto-Asocioj organizis diversajn samtipajn kaj samcelajn agadojn. Ekzemple en Britio, kie la britaj parlamentanoj estas invititaj partopreni prelegon pri Esperanto kaj por ĝia enkonduko en la instrusistemo.

Iuj el niaj legantoj certe havis la okazon esti informataj pri tiu agado pere de diversaj retlistoj tiaj, kiaj “Eŭropo” aŭ “Esperanto en lernejojn”.

Pere de tiuj samaj listoj EEU, per la voĉo de sia sekretario, sciigis sian malkonsenton (mi timus diri “sian kontraŭstaron”) pri la principo de

enkonduko de nia lingvo en la abiturientaj ekzamenoj.

Zlatko TIŠLJAR, en la retlisto “Eŭropo”, rememorigas la “strategion de EEU sur tiu kampo de enkonduko de Esperanto en la lernejojn”.

Li precizigas, ke:

“La nura sukcesa maniero plufosi tiun sulkon estas : ne klopodi enkonduki Esperanton kiel nur plian lingvon por uzi ĝin; sed klopodi enkonduki unuĵaran lernobjekton, kiu esence rapidigas lernadon de postaj fremdlingvoj. Kaj tiu lernobjekto baziĝas je Esperanto.

Ne estas la celo, ke la knaboj lernu Esperanton, por povi ĝin kvalite uzi, sed por lerni nur tiun parton de Esperanto, kiu vere konsciigas la lernantojn pri la bazaj aspektoj de gramatiko ĝenerale, kaj kiu helpas leksike por lerni kelkajn Eŭropajn lingvojn...”

Ja! EEU pravas!...

Jes! Ni devas, per instruado de Esperanto, profiti de la nekontestebla kaj konstatita propedeŭtikeco de tiu lingvo, kiu faciligas, plirapidigas kaj ŝatigas la lernadon de aliaj lingvoj. Tiun karakterizon ni cetere emfazas en la argumentaro de nia peticio.

Jes! Ni volas, ke Esperanto estu elemente instruata al la lernantoj ekde la elementaj lernejoj; kaj poste en la kolegioj. Tiucele cetere **UNESKO** alprenis antaŭ sesdek jaroj rezolucion validan por tutmondaj instrusistemoj (!).

Jes! EEU kaj UNESKO pravas!...

Sed mi persone, kadre de mia iama komisiono al Eksteraj Rilatoj de *Espéranto-France* havis plurfoje la okazon diskuti en ministerio pri instruado. Sed ĉiufoje mi devis kontraŭargumenti la samajn rediraĵojn.

Unue: “Esperanto havas nek kulturon nek literaturon”. Eĉ se Esperanto havas riĉan originalan literaturon.

Kaj eĉ se la alesperanta traduko estus la plej efika kaj monŝpara rimedo, por disvastigi kaj konatigi al la tuta ĉiulingva mondo (esperantistigita ekde la lernejo!) la literaturajn naciajn trezorojn.

Due: “Ne estas sufiĉe da Esperanto-parolantoj, por instrui la lingvon en la lernejoj”. Eĉ se estas evidente kaj pruvite, ke iu instruisto (se ne iu ajn?) povas samtempe lerni mem kaj instrui Esperanton al siaj lernantoj pro la facileco, la logikeco kaj la reguleco de la prononco, de la gramatiko kaj de la vortfarado de la lingvo.

Do! EEU pravas!...

Ni devas daŭre ĉiel klopodi por konvinki niajn leĝfarantojn kaj instruministrojn enkonduki instruadon de Esperanto en la bazajn lernejojn kaj en la kolegiojn.

Sed *Zlatko TIŠLJAR* ne tute pravas, kiam li volas elmontri, ke niaj peticioj por Esperanto en bakalaŭro estas senutilaj kaj eventuale ĝenaj.

Ja! la enkonduko de tiu facile lernebla Esperanto kiel laŭvola opcio en bakalaŭro kostus preskaŭ nenion. Dume tio kreus novajn Esperanto-parolantojn; tio trudus kaj finfine konvinkus la nun rezistemajn instruministrojn; tio faciligus la postan definitivan alprenon de Esperanto en la instruadan sistemon ekde la knabaĝo.

Ni do insiste, obstine, persisteme - kaj aparte insistante al niaj novaj parlamentantoj! – daŭrigu nian kampanjon por subskribo kaj plifortigo de nia peticio por :

ESPERANTO EN BAKALAŬRO

Claude LONGUE-ÉPÉE

Eksbatalanto (ne senkuraĝigita) al la politikistoj, al la parlamentanoj kaj al la instruministroj

Kiu estis tiu maljunulino ?

Sin demandas la aŭtoro *Roland PLATTEAU*...

Antaŭ kelkaj jaroj mi loĝis, en Araso, sur strato orta al alia pli granda, kiu nomiĝas "Strato *Saint-Michel*", kaj tiun-ĉi straton mi ĉiutage laŭiris por eliri kaj reeniri mian hejmon.

Ĝi estis burĝeca strato. Kaj ĉe la numero kvina de tiu-ĉi strato estis granda domo same burĝeca. Sed tiu domo estis tute forlasita, kaj nezorgita.

Tial kiom surpriziĝis mi iun tagon, kiam mi vidis (kaj poste mi plurfoje revidis ŝin) virinon maljunan, portantan provizsakon, malfermi la vastan porveturilan enirpordegon, eniri la domon kaj fermi la pordegon malantaŭ si! Ŝi ja loĝis tie!

Kaj, kiam mi metis scivole la okulon ĉe unu el la senkurtenaj fenestroj, mi vidis ene nur malhelan ĉambron, malplenan, malpuran kaj polvo-plenan. Mi ja ne sciis en kiaj kondiĉoj la maljunulino vivadis tie, dum la

domo aspektis ja delonge delasita. Mi ja scias, nek kiu ŝi estis, nek kion ŝi faris.

Ĉu ŝi estis vidvino? Ĉu maljuna fraŭlino, iu filino de gepatroj delonge mortintaj? Kiu plu loĝadis en ties domo? Mistero...

Poste, finfine mi neniam plu vidis ŝin... Pli poste, la domo supozeble estis vendita (...?). Kune kun la vasta ĝardeno, kiu kuŝis malantaŭe, kaj kies altaj arboj videblis de super la muroj, kiam oni iris al la alia flanko de la domarkvadrato, al la apuda garaĝo-benzinstacio, kiu situis ĉe la angulo de la strato kun la strato *Constant DUTILLEUX*.

Fine iuj laboristoj ĉion malkonstruis, lasante nur la malsupron de la fasado.

El la tereno fakte ili faris nenion, uzante ĝin nur por stoki malnovajn

veturilojn. Kaj nun eĉ la garaĝo estis ĵus forigita!

Restas plu nur tiuj ĉestrataj malplenaj murfundamentoj.

Nun, do, pensu pri la destino de tiu ĉi virino, nun tute forgesita de ĉiuj vivantaj teranoj... Supozeble jam senfamilia ŝi estis.

Sed pensu iom pri la vivo de tiu virino, kaj pri ties malapero en la nokto nigra de l'tempo eterna!

Kiel, kiel ne esti kortuŝita, emociita, malserenigita?

Indus starigi memorigan monumenton je ŝi, same kiel por ĉiuj vaguloj iam trovitaj frostmortintaj sur ia trotuar-angulo kaj kies nomon ofte oni eĉ ne retrovis.

Amikajn salutojn!!...

Verkis *Roland PLATTEAU*

Universala Kongreso

La – tre supraĵaj impresoj – de la sola nordfederaci-ano en la karavano de *Espéranto-France* al Vjetnamio kaj al la universala kongreso de Hanojo

Espéranto-France organizis turisman karavanon, de la 18-a de Julio ĝis la 7-a de Aŭgusto 2012, en Vjetnamio (Ho-Ĉi-Min-Urbo [Sajgono], *Hué*, Hanojo) kaj en Kamboĝo (*Angkor*). Tio inkluzivis la partoprenon en la Universala Kongreso de Hanojo (de la 28-a de Julio ĝis la 4- de Aŭgusto). La karavano estis tre bone organizita de « La Maison de l'Indochine » kaj surloke gvidata de lokaj ĉiĉeronoj tre kompetentaj kaj simpatiaj.

Partoprenis Dudek-sep gekaravananoj sub la gvidado de *Didier JANOT*, estrarano de *Espéranto-France*. Ĉiuj – malgraŭ la granda manko de nordfederacianoj – estis tre agrablaj kaj simpatiaj...



Dudek-sep gekaravananoj

Ili estis ankaŭ tre helpemaj al mia edzino *Francine* kaj al mi mem; ĉar mi ja ofte bezonis helpon... Mi ja estis malsana dum la tuta vojaĝo kaj fine devis restadi en la Franca

Hospitalo de Hanojo dum la fina duono de la daŭro de la kongreso!...

Mi tamen ne parolos al vi pri mia granda sperto – fontanta el mia persista diareo – pri la diverseco de la Vjetnamiaj necesejoj kaj pri la diverseco de ties postajpurigiloj – jen banalaj paperfolioj, jen efikaj akvo-ŝprucigiloj.

Mi ankaŭ ne parolos al vi pri la organizo de la Franca Hospitalo de Hanojo. Tie mi estis tre bone, kompetente kaj diligente flegata de kuracistoj scipovantaj la francan kaj de flegistinoj afablaj kaj ridetantaj... Kaj inter kiuj kelkaj scipovis la francan...

Dum nia turisma vojaĝo ni vizitis tre interesajn lokojn

Ĉie la pejzaĝoj estis verdaj kaj akvecaj (riveroj, lagoj, rizejoj kun dissemitaj tomboj meze de la rizo!). Ĉie svarmas abunda popolo, ĉu duondronanta en la akvo de la rizejoj, ĉu duonkuranta – piede aŭ sur motorcikloj – kun nekredeble pezaj kaj spacorabaj amaso da varoj, iloj, nutraĵoj kaj eventuale... infanoj!



Skotero estas la plej grava enurba veturilo en Hanojo.

Ni fakte estis surprizitaj en la urboj de la nombro kaj de la denseco de rotoj da centoj (eble da miloj...) da motorcikloj, kiuj fluas sur la stratoj, ofte misatentante la trafiklumojn.

En la urboj, ni estis surprizitaj ankaŭ de la nombro de elektraĵoj, telefonaj, diversaj dratoj kunligitaj kaj senorde pendantaj laŭlonge de la trotuaroj.

Ni vizitis plurajn stratbazarojn kaj subtegmente ŝirmitajn bazarojn; kaj ankaŭ boatbazarojn laŭ la bordo de riveroj. Oni trovas sur tiuj bazaroj ĉiuspecajn varojn, manĝaĵojn, fruktojn, ktp.

Sur la aleoj de tiuj bazaroj – kaj cetere ie ajn sur la trotuaroj – sidas sur siaj piedoj gecivitanoj, kiuj preparas, kuiras kaj manĝas rizon kaj legomojn en bovloj per manĝbastonetoj... kaj per la fingroj...

Sed, por ni turistoj, la organizantoj proponis tre komfortajn tristelajn hotelojn, taŭge klimatizatajn, kun akceptantoj kaj servistoj ege afablaj, ridetemaj kaj servemaj.

En la restoracioj – ĉu antaŭprogramitaj de la organizantoj, ĉu pli modestaj apud la kongresejo – mia kompleta perdo de apetito ne ebligis, ke mi taŭge taksos la kvaliton de la manĝaĵoj. Sed la observo de miaj samtablanoj kaj de ties reagoj kaj komentoj certigis al mi, ke la manĝ-

ajoj estas bone prezentitaj, ĉiam tre bongustaj kaj ĉiam (tro) abundaj.

Multajn famajn pejzaĝojn, monumentojn, muzeojn kaj metiejojn ni povis viziti kaj admirati, kiuj naskis miajn revojn. Cetere tiuj admirindaĵoj estas amplekse kaj detale priskribitaj en diversaj gvidlibroj kaj prospektoj. Persone, dum niaj ekskursoj kaj la klarigoj de niaj gvidistoj, mi notas nenion; mi tiel konservas en mia cerbo kaj en mia koro nur tion, kio profunde impresis min, miajn sensojn kaj miajn sentojn...

En Vjetnamio

Ni vizitis en Sajgono atelieron de lakajoj. Ni admiris la artecon kaj la lertecon de la geartistoj, kiuj kapablis aranĝi diversajn materialojn sur la lakajoj, por naski belajn bildojn.

Ni vizitis multajn templojn kaj pagodojn, en kiuj ni povis spiri la parfumon de la incenso kaj mire admiri la riĉecon de la statuoj, la fervoron de la preĝantoj... Kaj la aktivadon de la bonzoj!



Surakva bazaroj

Ni trapromenis, piede aŭ surboate, bazarojn, en kiuj amasiĝas manĝaĵoj, fruktoj, vestaĵoj kaj ĉiuspecaj varoj multkoloraj kaj multodoraj allogantaj la svarmantajn promenantojn.

Ni amuze kaj agrable vagadis, transportate sur la stratoj per individuaj taksibicikloj, kaj sur la riveroj per porgrupaj boatoj.

Ni krozadis sur la Halong-golfeto per luksa hotelŝipo, sur kiu ni tranoktis. Ni tiel admiris la belegan pejzaĝon de rokoj, rifoj kaj klifoj ŝprucantaj el la maro. Kaj ni vizitis la internon de kaverno en klifo... Admirinde! Ne forgesseble!...



Halong-golfeto

En Kamboĝo

Ni vizitis la templojn de Angkor, la renovigatajn gigantajn monumentojn. Kaj la ruinojn invaditajn de la radikoj kaj trunkoj de arboj.

Ni vizitis ankaŭ la "Domon de la odoroj".



La temploj de Angkor

Kaj ni povis spekti, dum nia lasta vespermanĝo, belajn lokajn dancojn. Ni vizitis ankaŭ silkfarejon, de la silkvermoj sur siaj specifaj arboj ĝis la ŝpinado kaj teksado de belegaj vestaĵoj, kiuj allogis kelkiujn el niaj karavananinoj.

El la kongreso mi povis partopreni nur tri tagojn, kaj mi do ne kapablos fari kompetentajn komentojn

Estis entute naŭcent partoprenantoj, kaj estis evidenta plazeruro revidi fidelajn geamikojn. Estis multaj reklamoj pri la kongreso sur la stratoj. Kaj ĉeestis multaj vjetnamaj freskbitaj esperantistinoj, kiuj montriĝis tre helpemaj kaj afablaj. Malgraŭ mia tro mallonga kongresumado, mi tamen ĉeestis – krom

la tradicia kaj ĉiam same emocianta solena malfermo, kaj krom la bela nacia vespero – plurajn interesajn prelegojn de la “Kleriga Lundo” kaj de la “Internacia Kongresa Universitato”.



Dancadoj dum UK.

Kadre de tio, mi tre aprezis la diraĵojn de Stefan MACGILL pri la “Vortŝercado en Esperanto”. Tio rememorigis al

mi la jarojn 1950-ajn, kiam mi estis studento en Parizo kaj fidele ĉiumerkreda ĉeestanto de la kabaredo de **“La Tri Koboldoj”** de Raymond SCHWARTZ kun liaj ĉiam renovigitaj ŝercoj kaj vortludoj!

Mi ankaŭ partoprenis la debatojn pri la kongresa temo **“Esperanto: ponto al paco, amikeco kaj disvolvigo”**. Sed bedaŭrinde mi ne povis partopreni la finan konkludan debaton... Fine mi ĉeestis ankaŭ la kunsidon, dum kiu niaj eminentaj akademianoj respondis al interesaj semantikaj demandoj.

Dum la longdaŭra aviada reveno de Hanojo al Roissy mi rememoris pri mia cerbriciĝa vojaĝo...

... Kaj mi denove admire pensis pri la

vigleco kaj la dinamismo de la vjetnama popolo.

Mi reripensis, ke tiu komunisma ŝtato iom post iom rezignas la kolektivigan sistemon, la kolhozajn kaj kooperativajn de la kamparo... Kaj tiel plibonigas sian produktadon. Mi memorante ankaŭ iom miras, ke en tiu komunisma reĝimo la infanoj devas pagi siajn studojn ekde la bazaj elementaj lernejoj. Kaj ke ne ekzistas sufiĉa specifa socia asekuro... Ja el la salajroj la patronoj pagas 12% kaj la salajroj 3% por la malsanoj kaj la emeriteco!...

Sed jen finiĝas la vojaĝo kaj miaj cerbumadoj...

Claude LONGUE-ÉPÉE
(KN 422) Aŭgusto 2012

El la gazetoj Ne! Nuklea elradiiteco ne estas kontaĝa!

Antaŭ pluraj jaroj, en nia tiam loka revuo **“Metropolo”**, aperis artikolo de mi verkita kun la titolo **“C12H22O11 kaj E=mC²”**. En tiu artikolo (kun la konfesita celo altiri kontraŭargumentojn,... kiuj verdire ne venis...) mi priplendis la meritojn kaj avantaĝojn: unue, de la rafiniteco de la sukero (C12H22O11) kontraŭ ties krudeco, pri kio mi daŭre kaj fortege plu samopinias; due de la elnuklea elektroenergio (E=mC²), pri kio mia opinio estas iom evoluanta (sed ne fundamente modifita...).

Pri tiu lasta problemo, certe kiel mi, multaj legantoj de nia gazeto regule ricevas de Hori JASUO, senpere aŭ pere de la retlisto “UFE-anoncoj”, novaĵojn el Japanio pri la terura katastrofo de la nuklea elektrocentraro de Fukushima. Ĉiuj tiel estas sciigitaj, ke pli ol 16 000 homoj pereis kaj 5 000 malaperis pro la tertremo, la cunamo, la nuklea katastrofego kaj ties sekvoj, ke la plantoj kaj legomoj de la regiono kaj la estaĵoj kaj fiŝoj de la maro restas nekonsumeblaj, ke multaj loĝintoj de la ĉirkaŭa regiono devis ĉi-tiun vakigi.

La raportoj aldiras, ke la spuroj de la nuklea akcidento ne malaperos antaŭ 40 jaroj, ke nuntempe nur du nukleaj centraloj el kvindek-kvar produktas elektron, ke tamen la japana elektrokompanio **TEPCO** kaj la japanaj aŭtoritatoj ne antaŭvidas, kaj ne povas antaŭvidi, la ĉesigon de la nuklea produktado de elektro.

Sed plej ĝenerale la raportoj insistas pri la ĝenerala kvalito de la gastigado de la japanoj farata al la malfeliĉuloj, kiuj estis forpeltitaj de siaj domoj, fabrikoj, lernejoj pro ties detruoj kaj pro riskoj de elradiado.

Sed la raportoj ne mencias eventualajn, sed ekzistantajn, turmentetojn kaj ĉikanojn faratajn kontraŭ infanoj devenintaj de Fukushima kaj suspektataj transdoni sian elradiitecon.

Mi alesperantigis ĉi-sube artikolon originale aperintan en la japana **“Tokyo Shimbun”** de Tokyo kaj kiun mi eltrovis en la revuo **“Courrier International”** en franclingva traduko. Ĝi proklamas la urĝecon lukti kontraŭ la antaŭjuĝoj kaj la ignoro.

Ne! La nuklea elradiiteco ne estas kontaĝa!

“Dum la monato Marto infanoj de Fukushima, veninte rifuĝi en *Funabashi*-on (en la prefekt-departemento de *Chiba*) estis superigitaj per turmentetoj kaj ĉikanoj de geknaboj de la najbareco, dum ili estis ludantaj en parko. La priedukada komitato de *Funabashi*, kiu estis informita pri tiu afero, reagis sendante cirkuleron al okcent dektri bazaj kaj mezaj lernejoj, por ke ili rekomendu al la lernantoj elmontri prizorgemon en siaj agoj same kiel en siaj paroloj al la junaj rifuĝintoj.

Tio ne estas la nura speco de diskriminacio, kiun prisuferas la evakuitaj loĝantaroj. Luj hoteloj rifuĝis loĝigi personojn venintajn el la damaĝita regiono, aliaj demandis la administraci-ajn oficojn, por scii ĉu ties gastigado estigas nenium ajn danĝeron. Kvankam tiajn sintenojn estigas la timo, ili duoble suferigas la viktimojn, kiuj jam travivas malfacilegan sperton.

Claude LONGUE-ÉPÉE

Eĉ se ne estas videblaj malordoj, multe da rifuĝintoj tiel ĉiutage devas alfronti diskriminaciaĵojn de si neniam imagitajn.

“La evakuitaj loĝantaroj el la ĉirkaŭaĵoj de *Fukushima* ne ricevis elradiadojn kaj eĉ ne estis agnoskitaj kiel elradiitaj. Estas absolute nenia kialo, por ke ili estu la celoj de diskriminacio”, klarigas **KAZUKIKO Maekava**, emerita profesoro de la universitato de *Tokyo*. Estas ja trege severaj la priradioaktivaj reglamentoj uzataj kiel bazoj de la instrukcioj por evakuado.

Necesas rememorigi, ke la elradiitoj de *Hiroshima* kaj *Nagasaki* longdaŭre suferis pro antaŭjuĝoj kaj ostracismo kaŭzita de tiu sama manko de informoj. Ne nur ili havis malfacilaĵojn trovi laboron kaj geedziĝi, sed ankaŭ iliaj gefiloj kaj iliaj genepoj prisuferis ilian

staton: krom la malsanoj estigitaj de la bomboj, ili estis timantaj ankaŭ alies malinklinon. Duobla puno estis tiel al ili trudata.

Kvin asocioj de elradiitoj de la prefektdepartemento de *Nagasaki* petis la gubernion de **NAOTO Kan** alpreni aranĝojn, por ke ne reokazu tielaj fenomenoj nomitaj “diskriminacio al *hibakushka* (elradiitoj)”.

Dependas de la aŭtoritatoj disdoni precizajn informojn por malaperigi la maltrankvilojn pro radioaktiveco. La timo de la plenkreskuloj resalte efikas al la infanoj, kaj tial la priedukada komitato de *Funabashi* postulis la kunlaboron de ĉiuj gepatroj. Certigante ke la adoltoj taŭge komprenas la informojn kaj ke ili havas ekzaktajn sciojn pri radioaktiveco, oni faras unuan paŝon al la forigo de la antaŭjuĝoj.

Pli ol tri mil gelernantoj de la baza kaj meza niveloj estis translokigitaj de la damaĝita zono de *Fukushima* al lernejoj de la prefektdepartementoj de *Tokyo*, *Chiba*, *Saitama* kaj *Kanagaŭa*.

Ni deziras, ke tiuj junuloj povu trankvile vivi en siaj gastiglokoj. La damaĝitoj de la regiono de *Fukushima* travivis la trioblan doloron de la tertremo, de la kunamo kaj de la nuklea akcidento; ni nepre ne suferigu ilin per kvara puno, lasante praktikaj tiajn diskriminaciojn.

Eltirita de “*Tokyo Shimbun*”

Aperinta franclingve en “*Courrier International*”

Esperanten tradukita de **Claude LONGUE-ÉPÉE**

Atesto de Esperantisto 31-a nacia Kongreso de la “naturamikoj”



Budo en la kongreso

Organizitan de la regiono Flandrio-Artezio-Pikardio, la Turisma Unuiĝo “**La Naturamikoj**” okazigis sian nacian kongreson, en “*Sportica*” *Gravelines*, la 6-7-8-ajn de Aprilo 2012.

Dum la kongresanoj pridebatis la orientiĝon de la movado, la gekompanantoj povis malkovri kaj

apreci, sub milda vetero, kelkajn vidindaĵojn de la regiono. Tio estas:

la fortikigita urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj; la natura rezervejo de la “*Oye-ebenajo*”; la konstruo de la ŝipo *Jean-*

Bart en la ŝipkonstruejo *Tourville*; la enklasigita pejzaĝo de la Du Kaboj; *Nauziaa*.

Bone akceptite en *Sportica*, la inaŭguro de la kongreso, farita sabatona posttagmeze de Sinjoro urbestro *Bertrand RINGOT*, estis pliagrbligita de ĝenerala surprizo al la membroj de la movado: la naskiĝo de iu nova membro, la giganto “*Naturamiko*”.


Simbolo de la movado kaj de la regiono, ĝi ankaŭ konkretigas, pere de sia nomo, la aligitecon de la naturamikoj al la internacia lingvo “*Esperanto*”, kiu pludaŭras interne de ilia movado.

Michel DECHY, esperantisto de Nordo, invitulo de la kongreso, priemfazis la ligilon inter la du tutmondaj asocioj. Post fruktodona laboro de la kongresanoj kaj alttaksata malstreĉiĝo de la akompanantoj, dimanĉa vespermanĝo, animata de folkloraj flandraj dancoj, finis tiun kongreson en la plej granda kontento de la kvarcent partoprenantoj.

Teksto redaktita franclingve de **Jean-Pierre QUIQUEMPOIS**

Esperanten tradukita de **Claude LONGUE-ÉPÉE**

"Tourcoing, Parc de l'Yser"



Desegnita de Lili **GILOTEAUX**

Traduko

Ĉina poemo

La ĉinan lingvon karakterizas (kaj malfaciligas!) muzikeca akĉento.

Tiu karakterizo eminentas en ĉinaj poemoj ; aparte en iuspecaj poemoj el sep versoj, kun rimoj laŭ "aaabbaa" kaj nombro de silaboj donanta la ritmon laŭ "6393339".

La evidenta malfacileco, kiu kuŝas en la apliko de tiuj reguloj (eĉ neeblo por la lasta postulo pri la nombro de silaboj) por alesperanta traduko de tiuspecaj ĉinaj poemoj, instigis famulojn tiajn, kiaj Waringhien, plenumi tian taskon.

Same nia amiko **Roland PLATTEAU** volis gustumigi al vi la belecojn de la ĉina poezio.

Jen la rezulto, tradukita el franclingva jama traduko de ĉina originalaĵo.

Komentas la redaktoro : **Claude LONGUE-ÉPÉE**

ĈINA POEMO

*Silente solece mi surŝtupas al okcidenta altano.
Falĉiletas la luno.
Profundkorte, inter paŭlovnioj, solecŝlosas min aŭtuno.
Penso: netranĉebla faden',
Kiel maltaŭzi ĝin ?!
Disĝodoloro
Strange bongustas en la koro.*

Esperantigis **Roland PLATTEAU**
la 13-an de Septembro 2004

G. MOUSTAKI (1969)

Le Métèque La fremdul'

Kun vizaĝ' mia de fremdul'
Greka paŝtist', vaganta Jud'
Kun harar' mia en la vent'
Helblua estas la okul'
Ĉiam aspektas mi revul'
Elrevigita en real'
Kun mia mano de ŝtelist'
De ŝtelvagul', de muzikist'
Mi ofte rabis en ĝarden'
Multege trinkis mia buŝ'
Kisis kaj mordis mia dent'
Ĝis la malsat' nenia venk'.

Kun vizaĝ' mia de fremdul'
Greka paŝtist', vaganta Jud'
Eta ŝtelist' kaj vagabond'
Multe sin banis mia haŭt'
En la somera varma sun'
En lito dolĉa de fraŭlin'.
Mirinde sciis mia kor'
Tro suferigi post dolor'
Sed ĉio sen revoluci'.
Sen ia sav' por la anim'
Nek ia ŝanc' al paradiz'
Kaj eĉ ne al purgatori'.

Kun vizaĝ' mia de fremdul'
Greka paŝtist', vaganta Jud'
Kun hahar' mia en la vent'
Mi venos, dolĉa kaptitin'
Vivplena font', ĝemelanim'
Kaj trinkos je via junec',
Ja estos mi via revul'
Aŭ via princ', adoleskul'
Laŭ via plaĉ' elektos vi
El ĉiu tago faros ni
Tutan eternecon da am'
Kiun ĝis morti vivos ni.

El ĉiu tago faros ni
Tutan eternecon da am'
Kiun ĝis morti vivos ni...

Tradukis
Michel DEREYER

Koncize Mallongaĵoj

Ĉirkaŭ la mondo

"Le Tour du monde en 160 langues". 850-paĝa libro de Henri **GOURSEAU**. Ducent frazoj de ĉiuj lingvoj ("L'Indépendant", de la 21-a de Aprilo 2012).

ARTE la 9-an de Majo 2012

La franc-germana televid-stacio "ARTE" detale prezentis proponon rilate la Eŭropan himnon en Esperanto. Ĝin kantis Sean **O'RIAIN**, laŭ teksto de Umberto **BROCCATELLI**. Detale raportis "**Esperanto**" de Majo 2012, p. 102; kaj "**La Ondo**" de Majo 2012.

Tri citaĵoj...

Ĉu simpligi ortografion?

"Si on débarrasse la langue française de toutes ses subtilités pour la transformer en espéranto, je ne vois pas comment elle pourrait séduire les étrangers." de P. **DELERM** en "Pleine Vie" de Marto 2012.

Papervojo

"Plier (le papier), c'est parler une langue universelle, une sorte de solfège ou d'espéranto". El "Sur la route du papier", paĝo 293 (E. **ORSENNA**, Eldonejo **Stock**).

Krucvortoĵ

Bone lokigi konatan 9-literan krucvorton: **ESPERANTO**.
El "Version Femina" numeroj 524/525, la 7-an de Aprilo 2012.

Poŝtaj servoj



En Turingio (Germanio) funkcias regionaj poŝtservoj, kiuj eldonis specialajn poŝtmarkojn. Ekzemple: tri memorigaj poŝtmarkoj pri **Richard BARTHOLDT** (1855–1932). En 1914, li proponis al la Usona parlamento rezolucion favoran al Esperanto.

Argumentaro de Richard BARTHOLDT antaŭ la Usona parlamento:

"La tuta mondo scias, ke ni Usonanoj malsufiĉe scias lingvojn. [...] Ĉiuj aliaj nacioj instruas du aŭ tri lingvojn en siaj lernejoj, sed ne ni. La internacia komerco absolute necesigas, ke al niaj junuloj estu instruataj almenaŭ unu aŭ du lingvoj krom la gepatra. [...] Preskaŭ ĉiuj civilizitaj landoj akceptis Esperanton kiel help-lingvon. Anstataŭ devigi la infanojn lerni la hispanan, la francan kaj la germanan, estus tre facile por ni instrui Esperanton. Nur unu leciono ĉiusemajne ebligus korespondadon kaj komunikadon per komuna lingvo kun ĉiuj aliaj landoj de la mondo. [...]

Ĉiu lando lernus sian lingvon kaj Esperanton: en Anglio la anglan kaj Esperanton kaj tiel plu. Tiel la internacia lingvo vere estus Esperanto. Mi ĵa iom studis lingvojn kaj komprenas, kiel handikapita sentas sin ekzemple viro, kiu, studinte la francan, vojaĝas al Parizo. Tuj kiam li ekparolas, ĉiuj rimarkas, ke li estas fremdulo, eĉ se li tre bone regas la francan. Franco parolanta kun li havus avantaĝon kompare al li. Sed se la franco devus lerni Esperanton, tiam ili estus sur la sama nivelo, kaj neniu el ili havus avantaĝon.

Mi legis en kelkaj Esperanto-gazetoj, ke ekzemple en Anglio grandaj fabrikoj nun presas siajn katalogojn kaj prezarojn en Esperanto, kaj ke aliaj komercaj presaĵoj en tiu lingvo estas dissendataj al la tuta mondo. Vi do vidas, ke tio venos. Kaj ĉar ni ĝis nun ne tro plenigis la cerbojn de niaj infanoj per lingvoj, estus bona kaj utila ideo komenci per Esperanto. [...]

Ĝi estas tre facila lingvo. Mi lernis ĝin dum kvar lecionoj. Kompren-eble mi ne havis la tempon por daŭrigi, kaj necesas praktiki. [...] Ĝin konsistigas vortoj el la angla, germana kaj latina lingvoj. Sed la tuta konstruo de la lingvo estas

tiel rimarkinde simpla, ke oni demandas sin, kial oni ankoraŭ ne enkondukis tian universalan lingvon por la uzo de civilizitaj homoj..."

Ankaŭ en Slovenio, eldono de poŝtmarko pri jubileo de Esperanto-klubo en Ljubljano (1921–2011).

Bunta kolekto

En la Aŭstralia revuo "Collectables", **Nicole ELSE** lerte prezentis sian Esperanto-bibliotekon. Diklitera titolo, tri paĝoj, ok fotoj (Oktoebro 2011).

Agemaj minoritatoj

Franca revuo publikigis 5-paĝan enketon pri minoritataj lingvoj (bretona, eŭska, okcitana, Korsika... (TC numero 3494 de Majo 2012).

Brita jubileo

En *Barlston* (Britio) okazis kvindek Esperanto-somerkursaroj. La venontaj eldonoj havos lokon en *Stafford*, apud *Stoke-on-Trent*. (MS)

Babelaj verkoj

En la belarta muzeo de *Lille*, pentristoj kaj fotistoj ekspoziciis, ĝis Januaro 2013, entute okdek kvin verkojn pri la ĉef-temo **BABELO**.

Nova Esperanto-domo

Antaŭ nelonge okazis solena inaŭguro de **BECKER-MEISBERGER** Instituto en *Blieskastel/Saar* (Germanio). La profesoro d-ro **SELTEN**, Nobel-premiito, festparoladis ("Mia vivo kun kaj por Esperanto"). (BMI)

Hunda haŭto

Libro de la albana verkisto **Fatos KONGOLI** "Hunda haŭto" aperis en Esperanto (tradukis **T. CHMIELIK**). La amaskomunikiloj amplekse raportis pri la akceptoj ĉe la Akademio de Sciencoj kaj la Ministerio pri Kulturo (*Tirana*, 2012).

Kompilis kaj komentis
Lucien GILOTEAUX

Atentigo de la redaktoro

– Mi atentigas al niaj karaj legantoj la ĉi-ene kunmetitan aliĝilon por nia Novembra renkontiĝo en *Stella-Plage*.

– Atentu ja, ke la programo de la kursoj estas iom ŝanĝita kompare kun la programo eldonita en nia numero de Junio. Tiu programo certe interesos vin. Vi tuj aliĝu – kaj aligu viajn geamikojn kaj la gelernantojn de viaj kursoj – se vi ne jam faris ĉion necesan...

– Aliflanke viaj artikoloj estas ĉiam bonvenaj ; ĉu ili rilatas al la vivo kaj al la historio de via grupo, ĉu ili pritraktas pli ĝeneralajn aŭ pli personajn temojn... Same ni ŝatus

esti sciigitaj pri viaj rimarkoj, komentoj aŭ kritikoj naskitaj de via legado de nia gazeto.

– Certe vi jam delonge pagis vian kotizon al via grupo kaj al la Federacio... Sed ni ŝatus, ke vi povu aligi novajn membrojn el viaj amikaro kaj konataro.

– Kaj ne tro malfru por kolekti novajn subskribojn sur la folioj de la peticio por **“Esperanto en Bakalaŭr-ekzameno”**, resendotaj al la precizigita adreso. Peticiofoliojn vi povas peti de, kaj resendi al:

Campagne Espéranto au Bac

17 Rue du Cambeilhou

64400 Oloron-Sainte-Marie

– **Informo pri Grezijono Aŭtune en kastelo de Grezijono, Kulturdomo de Esperanto**

De sabato la 27-a de Oktobro, ĝis sabato la 3-a de Novembro 2012: Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj. Kursoj, koncertoj, muzikado, promenado, ludoj, ktp. Specialaj gastoj: *Svetlana SMETA-NINA* el Moskvo, kaj *Kees RUIG* el Nederlando.

Grésillon, 49150 Saint-Martin d'Arcé.

Kontaktado: kastelo@gresillon.org

tel.: +33 (0)2 41 89 10 34

[http://gresillon.org/spip.php?](http://gresillon.org/spip.php?rubrique36&lang=eo)

[rubrique36&lang=eo](http://gresillon.org/spip.php?rubrique36&lang=eo)

Claude LONGUE-ÉPÉE

Asociaj kaj redakciaj informoj

FÉDÉRATION ESPÉRANTO NORD

Prezidanto (eldona direktoro de la gazeto):

Arlette PLUTNIAK

22 rue d'Arras 62123 SIMENCOURT

Tel : 03 21 55 61 35

eplutniak@esperanto-nord.org

Federacia retejo:

<http://www.esperanto-nord.org>

Sekretario:

Katja BOEN

51 Avenue du Maréchal Leclerc

59130 LAMBERSART

Tel : 03 20 92 31 36

cboen@esperanto-nord.org

Tarifo de kotizoj:

13 € por plenkreskulo, 8 € por junulo, studento, senlaborulo.

Per ĉeko al la ordono de “Fédération Espéranto-Nord” sendota al la kasisto:

Xavier VILAIN

Résidence L'Alcyon – Apt. 41

90 rue du Maréchal Joffre

59240 DUNKERQUE

Tel. 06 70 65 93 29

xvilain@esperanto-nord.org

BULTENO “NORDA GAZETO”

Ĉefredaktoro:

Claude LONGUE-ÉPÉE

320 rue des 4 Bons Dieux

59235 BERSÉE

Tel. 03 20 59 28 80

plongueepée@free.fr

Konstantaj korespondantoj:

★ **Amiens**

Cyrille DÉCOUTURE

prezidanto@esperanto80.org

★ **Arras**

Jean HENNEBERT

jhennebert@esperanto-nord.org

★ **Boulogne**

Marie-Jeanne LINÉ

mjline@esperanto-nord.org

★ **Dunkerque**

Elise DEPLA

edepla@orange.fr

★ **Lille-Villeneuve**

Katja BOEN

cboen@esperanto-nord.org

★ **Valenciennes**

Jean-Marc FRATARD

jmfratard@esperanto-nord.org

Enpaĝigado:

Cyrille DÉCOUTURE

10 chemin des Oiseaux

76270 FESQUES

prezidanto@esperanto80.org

Tel: 06 78 80 78 45

Kontrolantoj-korektantoj:

Claude Longue-Épée

plongueepée@free.fr

Pascal VILAIN

p.vilain83@orange.fr

Presado, enkovertigo, sendado:

Richard VALET

Rue du Boulenriez 59235 BERSÉE

rf.valet@wanadoo.fr

La teksto de artikoloj estu sendotaj antaŭ la 31-a de Aŭgusto 2012.

Partoprenis je tiu ĉi numero

Arlette Plutniak, Claude Longue-Épée, Cyrille Découture, Jean Hennebert, Michel Dechy, Renée kaj la grupo de Bulonjo-ĉe-Mar, Xavier Vilain, Jean-Marc Fratard, (Yves Nevelsteen), Roland Platteau, Jean-Pierre Quiquempois, Lili Giloteaux, Michel Dereyer, Lucien Giloteaux.